



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Septembro 2018 n-ro: 33



Merhaba,

28 Temmuz - 4 Ağustos tarihleri arasında 1,525'ten fazla esperantistin katılımı ile Lizbon Portekiz'de 103. Uluslararası Esperanto Kongresi gerçekleştirildi.

Türkiye'den kongreye 6 kişi katıldı:

- D-ro Ba Jing-ke - İstanbul
- S-ro Loris Bonnet - Ankara
- S-ro Lilian Bonnet - Ankara
- S-ino Cui Fen Du - İstanbul
- S-ino Guo Zhi Ling - İstanbul
- S-ino Yeliz Gan - İstanbul

Kongrenin teması "*Kültür, diller, globalleşme: şimdi nereye?*".

Kongre sonuç bildirgesini buradan okuyabilirsiniz:
<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2018/Rezolucio-de-la-103-a-Universala-Kongreso-de-Esperanto>

Hepinize iyi okumalar!

Saluton,

Inter la tagoj 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto okazis la 103-a Internacia Esperanto Kongreso en Lisbono Portugalio kun la partopreno de pli ol 1,525 esperantistoj.

El Turkujo partoprenis 6 homoj al la Kongreso:


- D-ro Ba Jing-ke - İstanbul
- S-ro Loris Bonnet - Ankara
- S-ro Lilian Bonnet - Ankara
- S-ino Cui Fen Du - İstanbul
- S-ino Guo Zhi Ling - İstanbul
- S-ino Yeliz Gan - İstanbul

La temo de la Kongreso estis "*Kulturo, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?*".

Vi povas legi la rezolucion de la Kongreso ĉe:
<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2018/Rezolucio-de-la-103-a-Universala-Kongreso-de-Esperanto>

Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
Eldonanto : Turka esperantistaro
Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Novjara Renkontiĝo (NR)	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
ILEI Anoncas	4
Esperanto ne estas mirakla rimedo	4
Homoj, kiel ĉiuj homoj	5
HEROA kaj LEANDRO	6
Eltiraĵoj el «Azijade» de Pierre Loti	8
Hajkoj pri Petar Petrov * - bildoj, plastikoj...	9
Ĉu ekzistas Esperanta kulturo?	9
La Amato	11
El la libro de "Dao de Jing" (25)	12
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 4)	13
Ŝercoj	14
Kurcvortenigmo	15
Du elturniĝemaj junulinoj	15
La naskiĝtago de Kristina	16
Mallonga Historio de Filozofio (32)	17
Unesko Kuriero	17
Gramatiko	18
Raportoj el Japanio	19
Samanta - Anekdoto	20
Miaj Esperanto-instruistoj	21
Rekorda NASK-o en Usono	22
Dido	23
Elpensi rakontojn ĵetkube	26
Malcifri la kodon de DNA	27
Salutmesaĝo de Unesko al la partoprenantoj de la 103-a UK	30
Vulpo kaj kapro	31
Facilaj rakontoj	32
La 12-a MONA Kunveno	32
Solvo de la Krucvortenigmo	32

Kursoj



Pro la somera sezono nun estas neniu aktiva Esperanto kurso en Turkujo.

Novjara Renkontiĝo (NR) en Wiesbaden, apud Frankfurto

La **17-a Novjara Renkontiĝo (NR)** ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2018 ĝis 3-a de januaro 2019, ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo en Wiesbaden, samtempe kaj samloke kun la 10-a NIS, la programo por junuloj.

NR do ĉi-foje estos proksime de Frankfurto ĉe Majno.

Jen la informa paĝo kun la aliĝilo.

Aliĝis intertempe jam 72 homoj el ok landoj, 40 el ili el eksterlando, 25 junuloj kaj infanoj.

http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr17.php

Se ankaŭ vi ŝatos partopreni, eble aliĝu ĝis venonta lundo, 23-a de julio, fino de la aktuala aliĝperiodo.

Jen la aliĝilo:

<http://esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>

Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj...

Multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS... :-)

Ĉu vi ŝatos festi kun ni novjare en internacia rondo? Do venu al la venonta NR!

Ĉion bonan al vi, belan someron kaj esperinde ĝis revido dum NR/NIS, por la organiza teamo de NR/NIS

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand



Fonto: <http://www.esperantoland.org/eo/plu.php?msgid=1218>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Esperanto-Sumoo

Mi intencis havi nur unu kunsidon pri tiu temo, sed Clay (Konstanta kongresa sekretario) proponis, ke mi havu plurajn, kaj laŭ lia konsilo mi havis du kunsidojn: la unuan en dimanĉo post la Inaŭguro kaj la duan en vendredo, antaŭtago de la Fermo, kaj dum tiuj 6 tagoj ni havis Lisbonan Konkurson de Sumoo. En la unua kunsido partoprenis 60 homoj, kaj el tiuj aliĝis 40 homoj al la sumoo. Preskaŭ ĉiuj estas partoprenantoj kaj partoprenintoj de la sumoo, do en la salono estis tre amika sento. En vendredo mi disdonis « diplomon » al ĉiuj kaj kune fotis. Ĉiuj laŭdis la projekton de la sumoo kaj promesis pli kaj plu varbi partoprenantojn.

HORI Jasuo (s-ro)



Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/75906697088217/?fref=ts>

UEA



N-ro 751 (2018-08-17)
50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF

Dum la fermo de la UK en Lisbono, UEA speciale honorigis la usonan fondaĵon ESF pro 50 jaroj da elstara agado. [...]

N-ro 750 (2018-08-10)

Premio Deguĉi 2018 al Katalin Kováts

Premio Onisaburo Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per kapitalo donacita de Oomoto. [...]

N-ro 749 (2018-08-10)

Rezolucio de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto

La 103-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018, kun 1567 partoprenintoj el 73 landoj, [...]

N-ro 748 (2018-08-09)

Du novaj membroj de la Honora Patrona Komitato

La Honora Patrona Komitato de UEA ekhavis du novajn membrojn: Vytenis Andriukaitis kaj Judit Polgár. [...]

N-ro 747 (2018-08-09)

Tri novaj Honoraj Membroj de UEA

En la 103-a Universala Kongreso en Lisbono UEA ricevis tri novajn Honorajn Membrojn. [...]

N-ro 746 (2018-08-08)

14 elstaraj agantoj diplomitaj en Lisbono

En la Solena Fermo de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono estis anoncigitaj [...]

TEJO



Estraro de TEJO 2018 – 2019

Ni ĝojas prezenti al vi la novan Estraron 2018–2019 de TEJO!

La komitato de TEJO elektis la novan estraron dum la IJK – Internacia Junulara Kongreso en Badajoz, Hispanio. Gratulojn al ĉiuj kaj bonan laboron!

Prezidanto:

Tran Hoan (Ĝojo), el Vjetnamio

Vicprezidanto 1:

Léon Kamenický, el Slovakio

Vicprezidanto 2:

Francesco Maurelli, el Germanio

Ĝenerala Sekretario:

Konstanze Schönfeld (Tuŝka), el Germanio

Kasisto:

Mung Bui (Feliĉa), el Vjetnamio

Estrarano:

Hans Becklin (Hanso), el Usono

Estrarano:

Arturo Crespo, el Kolombio

Estrarano:

Kingslim Edah, el Benino

Estrarano:

Olga Sevcenco, el Moldavio

<https://www.tejo.org/estraro-de-tejo-2018-2019/>



PREZIDANTO

Hoan Tran (Ĝojo), el Vjetnamio



VICPREZIDANTO 1

Léon Kamenický, el Slovakio



VICPREZIDANTO 2

Francesco Maurelli, el Germanio



ĜENERALA SEKRETARIO

Konstanze Schönfeld (Tuŝka), el Germanio



KASISTO

Mung Bui (Feliĉa), el Vjetnamio



ESTRARANO

Hans Eric Becklin (Hanso), el Usono



ESTRARANO

Arturo Crespo, el Kolombio



ESTRARANO

(Kingslim) Kossi Gadoufia Edah, el Benino



ESTRARANO

Olga Sevcenco, el Moldavio

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kara amiko,
Koran dankon pro la "Turka Stelo", aŭgusta numero. Mi ne povis tuj tralegi ĝin, ĉar mi ne estis en Sofio. Nun mi komencis legi ĝin kaj mi estis tre agrable surprizita, kiam mi vidis,

ke vi aperigis mian rakonton "La patrino". Mi kore dankas al vi. Nun mi sendas al vi mian rakonton "Lina kaj la donaco", dezirante al vi novajn sukcesojn en via nobla Esperanto-agado. Kore via:

Julian Modest, el Bulgario

ILEI Anoncas

La Ligo havas novan estraron. Hieraŭ la 24-an de julio okazis elektoj dum la komitatkunsido en Madrido okaze de la 51-a ILEI-Kongreso. Elektiĝis

* Prezidanto **Mireille Grosjean**

* Sekretario **Elena Nadikova**

* Kasisto **William Harris**

Plie elektiĝis en la estraro

* **Karine Arakeljan**, nova

* **Ivan Colling**

* **Yuro Jung**, « **Unika** », nova.

* **Radojica Petrovic**

La jarraporto pri 2018 kaj la financa raporto pri la sama jaro estis aprobitaj. La buĝeto por 2019 estis aprobita.

Kreiĝis laborgrupo por esplori pri la merkataka aspekto de niaj du revuoj **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)** kaj **Juna Amiko (JA)**. Ĝi konsistas el nia kasisto



2018-07-25 raportas Mireille Grosjean

William Harris, Karine Arakeljan,

Didier Janot kaj niaj du redaktoroj,

Jozefo Nemeth (IPR) kaj **Stano**

Marcek (JA). Fako estas, ke la eldono

de niaj du revuoj, kune kun defecito de kongresoj, kaŭzas defeciton por la Ligo. Do la laborgrupo devos esplori pri solvoj.

La surlokaj membroj de la nova Estraro jam kunvenis marde posttagmeze dum unu horo, kune kun **Karina Oliveira**, kiu pretas labori por ILEI laŭ siaj kapabloj kaj ebloj. Organizaj aspektoj de la laboro de ekzekutivo estis prezentitaj fare de la prezidanto.

Okazis ekzamenoj, provlecionoj, por du kandidatoj de **EO-Instruista Trejnado (EIT)** sub la gvidado de D-ino **Katalin Kovats**.

Marde vespere okazis bela koncerto de la duopo **KAJTO**.



Esperanto ne estas mirakla rimedo

Neniu pensu, Esperanto estas ellernebla sen lernado. Kvankam multaj esperantistoj fanfaronas pri nia lingvo, ke ĝin oni apenaŭ devas lerni. Sufiĉas aĉeti lernolibron kaj vortaron. Ili estas metitaj sub la kuseneton kaj ĝis mateno oni jam scias la zamenhofan lingvon.

Se iu opinias tiel pri Esperanto, tiam jam mi nun seniluziigas lin aŭ ŝin.

Verdire ĝi estas logika lingvo kaj ĝia gramatiko estas simpla. Se oni estas diligenta, tiam post kelkaj monatoj jam povas uzi ĝin, aŭ povas ekzameniĝi el Esperanto.

Perfekte ellerni iun lingvon estas neeble. Oni devas lerni ĝin ĝis la tombo. Ni ne forgesu, ankaŭ nian gepatran lingvon ni ne scias.

Do, laŭ mi estus laŭdinde, se ni parolas sincere pri Esperanto kaj ni ne trompas neesperantistojn.

Mi renkontis homojn, kiuj seniluziigis el Esperanto, ĉar iu misinformis ilin.

Krome, laŭ mi ne estas necese ĉiuokaze konvinki „novulojn” por ke ili fariĝu la membro de iu Esperanto

muzikistoj, komercistoj, vendistoj. Estas sciencistoj, instruistoj kaj iam mi eĉ konis advokaton.

Do, kiel mi diru... homoj, kiel ĉiuj homoj! – adiaŭante svingis la manon Ivan.

klubo aŭ societo.

Ĉiu mem decidu por kio li aŭ ŝi volas uzi la ellernitan lingvon.

Se ni perforte klubanigas la novulojn, tiam post iom da tempo ili sentas, Esperanto estas ia sekto, kiu eluzas ilin.

Esperanto restu helplingvo, kiun oni uzas por ke diverslingvaj homoj povu komuniki.

Eble dum la historio de Internacia Lingvo estis jaroj, eĉ jardekoj, kiam estis moda fondi Esperantoklubojn, grupojn.

Nun mi vidas tiel, ke estus pli laŭdinde, se nia lingvo ekaperus en la ĉiutaga vivo sur la stratoj, en oficejoj, vendejoj, stacidomoj ktp. helpante nian vivon.

Kompreneble, se iu sopiras agadi en Esperantokluboj, grupoj, ni ne baru antaŭ ili la vojon, sed ĉi lingvo kaj movado renoviĝu kaj ĝi estu egalrajta lingvo kun la aliaj.

— Redaktanto de Vesperto revuo —

Fonto: **Vesperto #313 junio 2018**

¹ "baj" iama vorto kiu devenas el la turka kaj kiu signifas "sinjoro, uzata kiam devas alparoli al pli aĝa homo.

tradukis kaj sendis **Elena Popova**, el Bulgario



**Rakonto de Vladimir Ĵelev
Ovĉarov, Bulgario**

Antaŭ multe da jaroj dum somero mi komencis labori en iu ripozejo. La dom-estro estis maljuna makedono, kiu naskiĝis en Skopjo. Parolante iufoje, li rakontis al mi, kiel li konatiĝis kun la blinduloj:



Mi havis parencon, kuzon, kiu loĝis en Sofio. Kun iu samkompaniano ili tenis laktejon proksime al la fervojstacio. La kuzo persvadis min translokiĝi en Sofion – la vivo tie estis pli bona. Mi preparis sakon kaj pakaĵon kaj ekiris al Sofio.

Mi trovis la laktejon. La kuzo multe ĝojis, ni brakumis, interkisis, kiel kutime, kaj li invitis min sidi ĉe tablo. Li alportis por mi tason da lakto, pecon da

pano, kaj sidis ĉe la tablo kaj ekparolis:

“Vi venis en malbona tempo, sed...” Mi rigardis al li timeme. Li frapetis min sur la ŝultron kaj diris:

“Aŭskultu, aŭskultu, la malbono estas, ke hodiaŭ mi estas sola. Ne estas por mi eble forlasi la laboron kaj konduki vin hejmen. Pro tio vi devas sidi ĉi tie, kaj se venos iu konatulo, mi petos al li, ke li konduku vin hejmen. Se ne, vespere, kiam mi fermos la laktejon, vin mi kondukos.”

Tiam li iris servi siajn klientojn. Mi sidis kun klinita kapo kaj pensis pri kio atendas min ekde nun en la estonteco. Tiel pasis unu horo aŭ du, eble pli kiam en la laktejon eniris iu nevidantulo, alta maldika viro kun dika blanka bastono enmane. Kiam lin vidis, mia kuzo ĝoje ekkriis:

“Ivane, vi venas ĝustatempe, Dio sendis vin. Mi bezonas vin por plenumi iun aferon.”

Li venigis lin ĉe mia tablo, donis al li seĝon, helpis lin sidi kaj turnis al mi: “Vi estas bonŝanculo. Li alkondukas vin hejmen.”

Verŝajne laŭ la mieno de mia vizaĝo, li komprenis mian miregon kaj gaje aldonis: “Ne timu, li konas Sofion pli bone ol mi. Ĉu ne, Ivane?” Li metis sian manon sur lian ŝultron kaj daŭrigis: “Ĉi-tiu estas mia kuzo el Skopjo. Ni faros lin sofianon. Konatiĝu!”

La viro etendis antaŭen sian manon, mi metis mian en la lian kaj mi sentis lian energian

manpremon. La kuzo altiris seĝon, sidiĝis kaj kliniĝis al li. “Unuvorte...” li diris kaj metis sian manon sur la lian. “Hodiaŭ mi estas sola. Ĉu vi povus alkonduki mian kuzon hejmen? Por ke li ne dormetu ĉi tie dum la tuta tago.”



“Mi povas, baj ¹ Simo, vi scias, ke mi estas libera homo. Kaj hodiaŭ mi estas tute sen laboro. Ĉu nun?”

“Nun. Vi permesu al li vin preni super la kubuto kaj antaŭen!” li diris rapide kaj iris malantaŭ la stablon, kie lin atendis klientoj.

Ni ekiris. Mi marŝis kiel je risorto. Mi pensis kaj timis, ke io okazos. Kien min alkondukas tiu blindulo? Ni pasis du vojkruciĝojn kaj Ivan haltis.

“Pro kio vi marŝas kiel stumblanta homo? Nu, prenu mian brakon, mi vin alkondukas!”

Mi plene konfuziĝis – kiel blindulo min alkondukas? Ivan diris pli akre:

“Nu, ne staru, prenu mian brakon kaj ni iru, ĉar nin atendas longan marŝadon.”

Ivan marŝis rapide, frapetante antaŭ si per la bastono. Nur de tempo al tempo li demandis:

“Ĉu dekstre estas io ajn?”

“Estas!”

“Ĉu maldekstre vi vidas ion ajn?”

“Mi vidas!”

Ni marŝis preskaŭ tutan horon kaj ni haltis antaŭ duetaĝa domo.

“Ĉu tie ĉi estas iu ligna pordo?”

“Estas!” – jesis mi.

“Supre maldekstre estas ŝnureto, tiru ĝin, ĝi estas la sonorilo.”

Mi ĝin tiris, oni aŭdis la latunan voĉon de la sonorileto. Oni aŭdis paŝojn, la pordo malfermiĝis kaj je la sojlo stariĝis diketa virino mezaĝa. Ŝi nin rigardis kaj seke diris:

“Ivane, kiu estas tiu?”

“Onklino, mi alkondukas al vi gaston el Skopjo. Nin sendis baj Simo.”

La virino rigardadis min kaj etendis brakojn:

“Tome, ĉu tiu estas vi? Mi ne povis vin koni. Nu, eniru!” Kaj ŝi malfermis por ni la vojon. Mi eniris kaj Ivan restis ekstere. Ŝi tiris lian manon:

“Ivane, eniru ankaŭ vi, mi vin regalos kun kafo.”

“Alia fojo, nun mi rapidas, mi havas laboron. Li sin turniĝis kaj frapetante per la bastono, rapide malproksimiĝis.”

Post tempo ni amikiĝis kun Ivan, kaj danke al li mi ekkonis la blindulojn en Sofio. Estas tiuj, kiuj agas tre supraĵe, sed la plimulto estas saĝaj homoj –

Al la ŝajne naiva mia demando, adresita al amika scienculo “per kio precipe la homo superas la ceterajn mamulojn?” mi ricevis respondojn, kiel: “la evoluinta cerbo”, “la parolkapablo”, “la rezonkapablo”, “la polekso” k.s.



Kompreneble mi tute respektas la specialistojn, tamen, en tiu ĉi kampo mi havas alian, certan opinion, do, mi aŭdacas objekti, ke la plej signifa homa karakterizaĵo, tio, kio precipe montras la superecon de la homa genro antaŭ la ceteraj estaĵoj estas la eroto, alivorte la seksa aminklino, la amo, eĉ la reciproka tia amo inter du personoj. Emfazante je tio, mi diros, ke, laŭ la sperto elĉerpita

el la vivo kaj la historio de la homaro, la plej granda, la vere nekalkulebla, netaksebla forto estas tiu de la reciproka anima kaj korpa altiriĝo inter du enamiĝintaj homoj.

Kaj en tiu ĉi mia prologo, kelkaj eble vidos trograndigon, tamen mi ne povus, eĉ mi ne rajtus diri pli malmulton, por enkonduki en la amhistorion de Heroa kaj Leandro.

Heroa estis belega junulino, kiu vivis en Sesto (Σηστός), urbo situanta sur la bordo de la traka duoninsulo, en la plej mallarĝa punkto de Helesponto (Ελλάσποντος). Tie, ĉe la maro, super kruta bordo plena je grandaj blokoj da rokoj, estis sufiĉe alta turo. Tiu turo estis konstruita en tiu dezerta, sovaĝa loko, iom malproksime de la urbo, ĉar ĝi estis sanktejo dediĉita al la adorato de la diino Afrodita (Αφροδίτη). En tiu sanktejo vivis, izole de la homoj, tiu Heroa, la belega junulino, kiu, dediĉite de ŝiaj gepatroj, servis kiel dumviva pastrino de la diino. Unu aŭ du fojojn en ĉiu jaro, okaze de festo aranĝita je honoro de Afrodita, la izolita loko pleniĝis de lokaj adorantoj, de vizitantoj el la proksimaj urboj, eĉ de fremdaj pilgrimantoj. Nur tiam Heroa povis vidi, kontakti kaj paroli kun aliaj homoj.

En la tute kontraŭa punkto de la helesponta mallarĝejo, sur la azia bordo, estis la urbo Abido (Αβυδος), en kiu loĝis Leandro, juna, bela kaj nobla viro. Kiam Leandro, okaze de tia festo, vizitis por la unua fojo la turon de Sesto, ekvidis Heroan. Tio sufiĉis! En la daŭro de la unua rigardo li sentis, ke ĉio en la mondo ŝanĝiĝis. La ĉarmo kaj beleco de la pastrino tuje korbatis la junulon, kiu restis senvoĉa,

kvazaŭ fulmotrafita. De la alia flanko, Heroa, ekvidinte la belan junulon, same fulme eksentis en la koro la dolĉan doloron kaŭzatan de la amora sago. Estis amoro malofta, forta, neretenebla!



Leandro ne foriris, li atendis ĝis kiam la festo finiĝis, ĝis kiam ĉiuj vizitantoj foriris. Tiam, li genuiĝis antaŭ Heroa, li konfesis al ŝi sian amon, sian pasion kaj deziregon igi ŝin sia edzino. Kun malĝojo kaj larmetoj Heroa eksplikis al li, ke ŝi ne povas edziniĝi, ke ŝi estas dediĉita al la diino, ke ŝi devas resti por ĉiam ĉasta kaj virga, malproksime de la homoj kaj de ĉia plezuriga rilato. Do, la kuniĝo de la geamantoj estis neebla, neatingebla, malpermesita.

La amo kaj la doloro, la dezirego kaj la despero ofte iras kune, kaj tion ĉi tre severe spertis kelkan tempon la geamantoj. Tamen, ili ne povis longe elteni, ili, do, allasis sin al sia pasio, kaŝe, tute solaj ili geedziĝis kaj komencis ĝui la amplezuron kaj la geedzan feliĉon. Mi diru, tamen, ke estis ia feliĉo lama, moderigita; la geedzoj ne povis vivi kune, ili povis renkontiĝi nur nokte, kiam neniu okulo povus ilin ekvidi. Do, Leandro restis en Abido, kaj ĉar ankaŭ boato povus esti distingebla en la mallumo, ĉiun nokton li sin ĵetis en la maron kaj naĝis de la unu bordo al la alia, li atingis sian adoratan edzinon kaj pasigis kun ŝi la nokton, avide trinkante la nektaron de la plenkotenteco. Tio daŭris ĝis antaŭ la matena krepusko, kiam Leandro naĝante revenis al Abido. Tiel, dum la tuta tago Heroa estis por ĉiuj la fidela pastrino, la ĉasta virgulino dediĉita al la sanktejo, kaj la nokton ŝi iĝis la flamanta amorantino de sia bela kaj brava edzo.

Havis multajn danĝerojn tiu eroto, tamen ĝi estis die dolĉa, la juneca ardo ne povis rezisti al ĝi. Tiel, la junaj amantoj sin lasis ebrie al la malpermesita feliĉo kaj la tempo de la ĝojo kaj plezuro pasis rapide kaj venis vintro kruela.

Laŭ interkonsento de la geedzoj, ĉiunokte Heroa metis sub la plej alta fenestro de la turo brulantan lampon, kiu, en la densa mallumo montris de malproksime la ĝustan direkton al Leandro.

La distanco inter la du bordoj estis longa, do, la ĉiutaga penado de la juna viro estis tre granda. Tamen, la ampasio donis al li la forton daŭrigi la ĉiutagan klopodon. Kiam la vetero estis trankvila, la afero estis ne tre malfacila, tamen, kiam ĝi estis ventega, la transnaĝado postulis forton kaj klopodon titanan.

La senmezura ĝojo ne povas daŭri longe. Kiam oni



ĝuas multon da feliĉo, devas atendi ke sekvos fatalaĵo. La fatalaĵo por niaj herooj

estis la alveninta vintro, unu vintro, kiel mi jam diris, kruela! La maro ne plu estis trankvila, iom-post-iome ĝi iĝis pli kaj pli sovaĝa, la ventoj iĝis pli kaj pli fortaj, la ondoj pli kaj pli altaj, kaj Leandro, kiu devis nun peni duoble por atingi sian amrifuĝejon, eksentis, ke li ne povos longe elteni la ĉiutagan bataladon kontraŭ sia sorto.

La geamorantoj, kun granda malĝojo akceptis, ke ili devas disiĝi ĝis la printempo. Doloriga decido, kiu estis akompanata de korŝira plorado, abundaj larmoj, senfinaj kisoj, karesoj, brakumoj. Tamen, ĉio tio ĉi ne estis sufiĉa por malsoifigi la junecan pasion. La geedzoj interkonsentis renkontiĝi unu fojon ankoraŭ, por interŝanĝi la lastajn kisojn, promesojn, konsilojn.

Tiun lastan vesperon, Heroa preparis malgrandan feston, ŝi zorgis pri la plej bongustaj frandaĵoj, vinoj, ŝi zorgis pri sia tualetto, dezirante sin prezenti kiel eble plej bela al sia amata edzo. Ĉe la komenco de la noktiĝo, ŝi preparis la lampon, ŝi ŝanĝis meĉon, ŝi aldonis oleon, ŝi metis ĝin en la taŭga loko, ŝi ekbruligis ĝin, kaj, kiam ĉio estis preta, ŝi genuiĝis antaŭ la altaro kaj preĝis al la diino, petante por la mila fojo pardonon pro sia profanado kaj petegante per sia tuta koro kaj kun multaj larmoj pri la sendanĝera alveno de ŝia edzo.

La vetero estis kruda, la vento furioza, la maro ŝvelinta, la ondoj altegaj, tamen Leandro, armita per sia fera forto, per sia granda deziro gustumi ankoraŭfoje sian neelĉerpeblan feliĉon, ne hezitis, li plonĝis en la maron kaj komencis lukti kontraŭ la ŝtormo, kontraŭ la destino, kontraŭ la dia volo.

Tiun ĉi fojon, la naĝado estis treege malfacila, Leandro, per sia tuta forto, klopodadis antaŭeniĝi sed la ondoj ĵetadis lin malantaŭen, la akvo ŝaŭmis, kirliĝis, detenis, ne lasis lin naĝi libere. Malgraŭ tio ĉi, li havis ankoraŭ fortojn kaj kuraĝon, li daŭrigis la luktadon, tamen, post nelonge, li vane ŝerĉis pri la lumsignalo de Heroa; en la plena mallumo li rigardadis ĉirkaŭen, tamen, la konata lumo estis nenie. Li naĝadis forte, li ankoraŭ venkadis la ondojn, tamen, nun li moviĝis sendirekte, li iris jen antaŭen, jen malantaŭen. La senstela ĉielo, kvazaŭ nigra kurteno

kovris ĉion kaj Leandro iom-post-iome perdis siajn fortojn, baraktadis laŭ la direkto de la ondoj, estis nun ia lukto, ia senforta, senespera lukto kontraŭ la morto, kiu fine venkis; Leandro allasis sin, perdiĝis!

En la turo, Heroa estis maltrankvila, Leandro malfruiĝis, la ventego iĝis pli kaj pli furioza, ŝi ne povis resti en unu loko, ŝi lasis sian observejon, ŝi descendis, ŝi malfermis la pordon, la vento forte blovis internen. Ŝi vane klopodis distingi en la mallumo homan movon, homan signon en la ŝvelinta maro. La ondoj, muĝante falis sur la rokojn, la vento puŝis ŝin malantaŭen, ŝi ne povis plu stari ekster la pordo. Ŝi revenis en la turon, al sia observejo, kaj tie ŝi trovis la olelampon estingita. La vento, kvazaŭ venena serpento, kvazaŭ insida ombro, estis estinginta la meĉon. Heroa tuj rebruligis la lampon, sed nun, preskaŭ kun certeco ŝi sciis kio vere okazis, kion ŝi devas atendi.

La nokto pasis turmente, horore, kaj kiam la unua lumo tuŝis la flankon de Sesto, Heroa kuris eksteren; ŝi rigardis la ĉielon, ŝi rigardis la maron, ŝi rigardis la bordon, kaj tie, malsupre, sur la krutaj rokoj, lante lulata de la lastaj, senfortaj fluoj de la ondoj, estis ĵetita la morta korpo de la amata viro. Ŝia lamentkriego, akompanata de la ŝtorma bruego, trapasis la maran mallarĝejon, ĝi atingis Abidon, ĝi penetris la kampojn, la valojn, la montojn, ĝi atingis Olimpon (Ολυμπος), ĝi vekis la diojn.

Heroa faris nur tion kaj tuj poste, kvazaŭ obeante al peto de sia amanto, ŝin ĵetis en la maran abismon! Regis kelkmomenta silento, morta silento; la mara kirliĝo ekĉesis, la ventego iĝis karesa bloveto, la ondoj tenera tremeto. La naturo ŝtoniĝis, ĝi estis venkita! Estis nur por kelkaj momentoj, tamen, estas vere, la naturo estis venkita de la amo!

La marfluo puŝis la du korpojn en lokon glatan kaj tie la homoj trovis ilin firme brakumitaj. Oni enterigis ilin kune kaj Heroa por ĉiam dormas feliĉe en la sekura brakumo de Leandro.

Jen, tiu ĉi estas la plej bela amhistorio de ĉiuj epokoj. Estas la historio kiu en la daŭro de miljaroj kortuŝas la homojn kaj estas la historio kiu plej multe el ĉio alia inspiris tiom multajn artistojn, kiuj kreis mirindajn poemojn, kantojn, romanojn, teatraĵojn, muzikaĵojn, operojn, pentraĵojn, skulptaĵojn, ĉiajn artverkojn.

Ekde la plej foraj antikvaj jaroj, ĝis nun, multaj homoj, verkistoj, esploristoj, artistoj, kredis ke tiu historio estas ne mito, sed realo. Kelkaj eĉ indikis la lokon en kiu la geamantoj estis enterigitaj. La granda angla poeto Bajrono, kiu, inspirite de la historio de Heroa kaj Leandro, verkis sian mirindan eposon "The

Bride of Abydos”, vizitis la lokon de la antikva Abido kaj por montri ke la historio povus esti reala, li mem transnaĝis tiun 2000metran mallarĝejoin de Helesponto.

Tamen, ĉio tio ĉi lasas min indiferenta; kortuŝas min la tragika amhistorio kaj mi ĉiam pensas pri la nevenkebla forto de la amo. Estas certe, ke tiu eroto estis venkita ne de io homa, ne de io natura, ĝi estis venkita ne de la vintro, ne de la ŝtormo, ne de la mallumo, sed de la ofenditaj, ĉiopovaj kaj enviemaj dioj!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo



Eltiraĵoj el «Azijade» de Pierre Loti

Roland Platteau, el Francio



Ĉapitro XLIX:

Kaj poste ŝi pensadis al l'estonto, al tiu estonto nekonata kaj malklara, kiu fascinis sian penson. Maljuneco, - afero tre fora, kiun ŝi ne bone prezentis al la menso... Sed kial ne maljuniĝi kune, kaj interami plu; - interami eterne en vivo, kaj post vivo.

- "Sen koĝa", ŝi diris (vi estos maljuna); "ben koĝa" (mi estos maljuna)..

Tiun lastan frazon ŝi apenaŭ elparolis, kaj laŭ ŝia kutimo pli bone mimikis ol diris; Por diri: "Mi 'stos maljuna" ŝi rompigis sian junan voĉon, kaj dum sekundoj kelkaj ŝi kuntiriĝis tiel, kiel maljunulineto, kurbigante sian korpon tiom plena je arda kaj freŝa juneco.

- "Zarar jok" (ne gravas) estis la konkludo ; Ne gravas, Loti, ni amos nin ĉiam.

Ejub, februaron 1877

Kiom malordinara eko, se pensi pri tio, tiom la komenco de nia historio !

Ĉiaj malsingardoj, ĉiaj mallertaĵoj kolektitaj tag-post-tage dum monato en celo plenumi rezulton en si mem neeban.

Sinvesti kiel turko en Saloniko, en kostumo, kiu al ĉiu iom atenta okulo, pekis eĉ nur rilate ĝustecon de l'detaloj ; tiel piediradi tra urbe, dum nura demando farita de preterpasanto povus perfidi kaj perdi la riskeman «ĝiaur»-on ; amindumi al islamana virino sub ŝia balkono, senantaŭaĵa entreprenitaĵo en arĥivoj de Turkio, kaj ja tio ĉi, diable ! simple por forkuri el la vivenuo.

Lasta ĉapitro:

La malvarmaĵo, kiun mi tenis premege inter brakoj, estis marmorŝtono enfostita en grundo.

Por ŝi, kiu tie kuŝas, mi ĉion forgesis!.... Amis ŝi min, per amo plej profunda kaj plej pura, plej humila kune; kaj ŝi mildege, lentege, malantaŭ kradoj de l'haremo, mortis pro doloro, ne sendinte al mi plendon. Ja aŭdas mi plu ŝian seriozan voĉon diri: "mi 'stas nenio pli ol eta ĉerkesa sklavino, mi... Sed, vi, scias vi; foriru Loti, se tion vi volas; agu vian volon!"

Suno subiĝintis malantaŭ la sankta monteto Ejubo, kaj somernokto klarega sin metis sur la heredaĵon de Osman...

...Tiu abomenaĵo, kiu troviĝas sube ĉi, tiom proksime al mi, ke mi ektemas, tiu abomenaĵo jam vorita de l'tero, kaj kiun mi ankoraŭ amas...Ĉu ĉio jen Dio?... Aŭ ĉu eble estas nedifinita resto, spirito, kiu ŝvebas ĉi tie en pura l'vesperaero, io, kiu povas vidi min, ankoraŭ plorantan tie surĉitere?...

Dio mia ! por ŝi mi apenaŭ ne preĝas ; mia koro, malmoliĝinta, fermiĝinta kontraŭ farseco de l'vivo, nun malfermiĝas al ĉiuj dolĉaj la eraroj de l'homaraj religioj, kaj faladas larmoj miaj sur la nuda tero. Ĉu ĉio eble ne finiĝas en malluma la pulvoro, tion mi eklernos eble baldaŭ, mi estas provonta morti, por ĝin scii...

(NB: la tripunktoj estas en la teksto mem)

esperantigis **Roland Platteau**, el Francio

Pierre Loti estis franca mara oficisto konata pro siaj ekzotaj noveloj. Li pasigis konsiderindan tempon en Istanbulo dum la Osmana imperio. (Vasil Kadifeli)



Mia kara ter' –
naskolok' en la koro.
Oni ne vendas.

Li kaj Ŝi survoje –
Fortuna decido, sed...
estos ventegoj.

Eva kun pomo –
korpa kaj spirita ĉarm'.
Tento embuskas.

“Direktoj” – Kien? –
propra elekto. Iam,
ie finiĝas.

Memor' en bildo –
brilas ora somere
nia naskolok'.

"Kronometro" – La
tempo kuras. Ne perdu
eĉ momenton! Ja

“La muroj” – baroj
por nia vivkreskado?
Ne, murpentraĵoj!

En “Purpura nokt”
ĉu li enigmojn pentris?
Anima riĉec'.

“Printempa pejzaĝ” “
en la anim' de pentrist'.”
Aŭtuno venis.

La aŭtor' pentras.
Silentu! Li ekflugas
post la ideo...

* Petar Petrov estas pentristo en urbo
Dobriĉ, Bulgario



verkis kaj sendis
Elena Popova,
el Bulgario

Ĉu ekzistas Esperanta kulturo?

Esperanta kulturo - ĉu ĝi ekzistas aŭ ne? La esperantistoj ofte starigas tiun ĉi demandon. Multaj el ili estas firme konvinkitaj, ke Esperanta kulturo ekzistas, ke dum jarcento en Esperanto estas kreita riĉa originala literaturo, abundas valoraj tradukoj, ne mankas ankaŭ teatraj, eĉ muzikaj prezentoj en Esperanto kaj tio formas originalan, malgraŭ nekutiman kulturon, kiu tamen jam estas ero de la vasta monda kulturo.

La reprezentantoj de la alia tendaro provas konvinki nin, ke Esperanto estas nur ilo, nur lingvo, kiun parolas homoj el diversaj popoloj kaj nacioj, kiuj, malgraŭ la ekzistantaj literaturaj kaj teatraj verkoj en Esperanto, ne povas formi memstaran kulturon, ĉar mankas kulturaj tradicioj, mankas unueca homgrupo, kies komuna historio kaj etna evoluo povus krei memstaran kulturon. Laŭ mi en iliaj asertoj ne mankas logiko, sed ŝajne ili pravis rilate la unuan periodon de la evoluo kaj disvastiĝo de Esperanto-movado. Tiam, malgraŭ ke de la komenco estis kreitaj originalaj

de Julian Modest, el Bulgario

literaturaj verkoj en Esperanto, ni ankoraŭ ne povis paroli pri apero de Esperanta kulturo, ĉar fakte la unuajn literaturajn verkojn kreis esperantistoj el diversaj landoj kaj la sola komuna trajto de tiuj ĉi verkoj estas la lingvo Esperanto, en kiu oni kreis ilin. Tamen jam en la unuaj Esperanto-verkoj ekaperis la originala kerno de la estonta Esperanta kulturo, nome, ke la Lingvo Internacia celas solvi ne nur la mondan lingvan problemon, sed la plej nobla ĝia celo estas la amikeco inter la homoj kaj tiu ĉi ĉefa ideo estis brile esprimita jam en la fruaj Esperanto-verkoj.

Iom post iom tiu ĉi ideo fariĝis gvida en la Esperanta literaturo kaj nun la ĉefa trajto de nia literaturo estas homamo.

Kiel ĉe ĉiuj nacioj, la kulturo formiĝas longe kaj malrapide. Necesas multaj generacioj kaj ĉiu generacio estas deviga riĉigi la kulturan trezorejon de sia nacio. Ankaŭ la Esperanta kulturo bezonas la kontribuon de pluraj generacioj, sed sendube la fundamentoj de la Esperanta kulturo estas firme

starigitaj. Post la unuaj nekuraĝaj provoj de la Esperanto-pioniroj, inter kiuj estis talentaj poetoj, verkistoj, artistoj, eĉ kantistoj, venis la dua generacio, kiu jam havis la necesajn ekzemplojn kaj modelojn. Ni ankoraŭ ne sufiĉe bone esploris la vojon, la formiĝon de la Esperanta kulturo, sed ŝajnas al mi, ke ĝi sekvas la naturan evoluon de ĉiuj naciaj kulturoj.

Pro la fakto, ke Esperanto naskiĝis en Eŭropo kaj pli ĝuste en la slavaj regionoj de Eŭropo, ĝia kulturo, pli precize ĝia literaturo estis forte influita de la riĉa slava literaturo - rusa kaj pola. Zamenhof, Grabovski, Kabe, Devjatnin kaj preskaŭ ĉiuj poetoj kaj verkistoj de la slava skolo, alportis al nia literaturo elementojn el la slava literaturo, slava kulturo, kiu nur helpis la junan Esperantan literaturon kaj kulturon. Poste venis la influo de la franca literaturo, dank' al la talentaj verkoj de kelkaj francdevenaj esperantistoj.

Iom post iom nia literaturo liberiĝis de la influoj kaj en ĝi eksonis tute originalaj voĉoj, kiuj alportis originalajn motivojn kaj ideojn.

La dua generacio de la Esperantaj kreintoj jam havis la malfacilan, sed noblan taskon formi la veran vizaĝon de nia literaturo kaj prepari la grundon, sur kiu poste devas elkreski kaj ekflori la bela arbo de la Esperanta kulturo. Grandega estas la rolo de Kalocsay kaj Baghy kaj malgraŭ ke ili alportis la influon de la hungara literaturo kaj kulturo, ili tamen formis la unuajn trajtojn de la nova Esperanta kulturo. Laŭ mi ili estas la unuaj veraj kreintoj de nia kulturo, ĉar ili daŭrigis la laboron de Zamenhof, Grabovski, Kabe kaj formis la tradicion en la Esperanta kulturo.

Nun ni ne povas imagi la eminentajn tradukojn de Kalocsay kaj liajn originalajn poemojn, se ne ekzistis la modelaj tradukoj de Grabovski. Ni ne povas imagi la allogan prozan stilon de Julio Baghy, se li ne konis la tradukojn de Kabe aŭ pli ĝuste la klasikan tradukon de "Faraono".

Kalocsay kaj Baghy fidelis al la tradicio kaj daŭrigis la tradicion. Kalocsay dum mallonga tempo prilaboris la Esperantan poetikon kaj donis brilajn modelojn de Esperantaj sonetoj, baladoj, rondeloj. Baghy kreis la unuajn verajn Esperanto-romanojn kaj pruvis, ke en la Lingvo Internacia povas ekzisti Esperanto-romanoj. Eĉ en lia krestomatia "Verda koro" rolas esperantistoj, kiuj malgraŭ iom flanke tamen esprimas Esperantajn problemojn.

Post la Dua Mondmilito sur la firmamento de nia Esperanta kulturo aperas novaj kreintoj, sed ili ne aperis el nenio, ili venis por daŭrigi la laboron de siaj antaŭuloj kaj instruistoj. Nun eble William Auld ne estus tiel forte ligita al la Esperanta kulturo, se ne ekzistus la literatura agado de Kalocsay kaj Eŭgeno Mihalski, aŭ Marjorie Boulton kaj Eli Urbanova ne

povus enpenetri profunden en la maltrankvilan inan animon, se antaŭ ili ne estus la teneraj inaj poemoj de Hilda Dresen.

Tamen kiam ni parolas pri la Esperanta kulturo ni ne devas pensi, ke ĝi estas tute fermita kaj memstara. Tiu ĉi kulturo eble apartenas al la plej larĝe malfermitaj mondaj kulturoj, ĉar ĝiaj kreintoj estas reprezentantoj de diversaj popoloj kaj nacioj kaj malgraŭ ke ili vole aŭ nevole sekvas la tradiciojn de nia juna kulturo, ili alportas en ĝin la motivojn, la elementojn de siaj propraj naciaj kulturoj. Tial en la Esperanta literaturo oni rimarkas hispanajn, brazilajn, japanajn motivojn, kiujn oni malfacile povas malkovri en kiu ajn eŭropa aŭ azia kulturo.

Nia Esperanta kulturo ankoraŭ estas tro juna, sed laŭ mi, ĝi rapide evoluas kaj tion atestas ne nur ĝia sufiĉe riĉa literaturo, sed ĝia teatro, ĝia pupteatro, ĝia muziko. Ni nur povas bedaŭri, ke ni ankoraŭ ne havas ampleksajn literaturajn revuojn, pli stabilajn libroeldonejojn, konstantajn teatrojn, filmojn, pli vastajn radio- kaj televid-elsendojn kaj kompreneble lernejojn, en kiuj la Esperantaj kulturaj valoraĵoj edukas en la junaj esperantistoj homamon. Tamen la juna Esperanta kulturo ekzistas kaj tion pruvas la kongresoj, la festivaloj, la naciaj revuoj de Esperantaj kanto kaj parolo.

Ĉi-jare mi partoprenis kiel ĵuriano de Nacia revuo de Esperantaj kanto kaj parolo en urbo Stara Zagora, kie ravis min la entuziasmo, la fervoro de la multnombraj junaj partoprenantoj. Ili recitas poemojn de la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-poetoj, ili kantas vere belegajn kaj originalajn Esperanto-kantojn kaj tio montras, ke la Esperanta kulturo ne nur ekzistas kaj vivas en ili, sed ili mem estas kreintoj de tiu ĉi kulturo. Kaj nevole mi pensas, ke kulturo, kiu eniris kaj flamigis la junajn korojn ne povas malaperi, ĝi vere ekzistas kaj ekzistos.



Julian Modest, Sofio, la 20-an de aŭgusto 1989
(el la libro de Modest "*Literaturaj konfesoj*")

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Mi ne plu povis toleri lin apud ŝi. Ili kunpromenis preskaŭ ĉiutage. Eĉ ankaŭ dum la vesperoj. Tion vidis preskaŭ ĉiuj miaj samklasanoj. Kia honto por mi, kiam ili mokadis min kaj ridegaĉis pro la kunpromenoj ŝiaj kun li. La onidiraĵoj nervozigis min, same kiel mem la renkontiĝoj, kiuj jam fariĝis abomeninda kutimaĵo, kiun mi tute ne povis toleri, sed ankaŭ ne povis haltigi.

Lun malfruan matenon, je la deka kaj dek kaj duono, kiam mi trinkis la ĉiutagan kafon, antaŭ ol eliri en la urbon, ŝi petis min ke mi aŭskultu ŝin atenteme, ĉar ŝi eldirus ion, kion mi devus scii. Mi pretaŭskultis kaj ŝi donis min la malsanigan kaj dolorigan novaĵon, kio malĝojigis min same kvazaŭ temus pri la morto de la patro. Tio igis min senvorta ĉar mi ankoraŭ kredis ke inter ili ne ekzistis io tia kaj ke la mokaĵoj de la amikoj estis simple onidiraĵoj sen ia maliceco, nur por envane ridadi. Mi ne povis eldiri ion, tiun momenteton, sed simple mi elprenis tutrapide la cigaredujon kaj eliris en la urbon.

Li ne estis simple ŝia laboreja kolego. Ili estis ligitaj ekde kvar longaj jaroj, kaj neniu sciis pri tio intertempe, kaj neniam oni eksciis se ili ne interkonsentus por kunpromeni malkaŝe. Ili eĉ estis decidinta kunvivi, ĉar estis enamiĝinta unu al la alia. Mi ne povis kredi al la vortoj, kiujn aŭskultis miaj oreloj el ŝia buŝo, kiu diradis ke nenio ekzistis en ŝia vivo pli valora ol mi kaj ŝi vivus nur por mi.

* * *

Agim, mezoviro, fraŭlo, pli ol tridekjara, alvenos vivi en nia domo. Li eniros kiel okupanto por elpreni la vakantan tronon, kiun li forrabus tiel facile, sen glavo aŭ lanco enmane, sed simple per unu valizo, plenigita je lavitaj aŭ nelavitaj vestaĵoj, kiujn mi ekvidos jam ĉiun horon aŭ momenteton sur nia balkono. Intertempe, la vestoj de la gvidanto, kiu ne plu estas ĉe ni, enmetiĝos profunde en la malnovaj kestegoj, oni alportos ilin en la supran etaĝon de la domo, kiun ni aliigos kvazaŭ en hejman muzeon, kie konserviĝos liaj kozo kiel reliktoj de la pasinta tempo.

La hejma gasto, kiu baldaŭ fariĝos nia mastro, certe ŝanĝos la leĝojn, samkiel ĉiu novtronula gvidanto. Eble li ordonos min kun kiu mi akompanu aŭ ne, kiam mi elhejmiĝu kaj kiam ne. Agim, kalvula maljunfraŭlo, anstataŭos la patron aŭ okupos la ties lokon ĉe la kameno, eksidos ĉefronte de la malalta

manĝotablo, kie ĉiam la patro sidis, li ekdormos ĝuste sur la lito kie, ĝis antaŭ sep jaroj, la patro ja dormis. La ĵusalveninto amoro kun la edzino de mia patro, edzino de la iama amiko kaj kunvojaĝanto lia sur la malfacilaj vivopadoj. Tiel diradis li al mi mem, ne rarfoje, en nia hejmo, kiel malnova amiko de la patro, de kiu li elprenas nun unu el du plej karaj kozo.

Mi petis mian patrino ne fari tion, ne venigu fremdulon en nia hejmo, ĉar tio igus min senti hontema antaŭ miaj amikoj. Sed ŝi estis jam decidinta tion kaj neniel povus retiriĝi.

Agim ekloĝos sub la sama tegmento kun ni. Tion mi ne povas engluti facile, ĉar li neniel plaĉus al mi, aparte pro tio ke, kiomfoje li venis en nia hejmo, de momenteto al momenteto, li orgojladis pro fakto ke li ege penadis por savi la patron, kiel li klopodadis gardi lin kaj kiel li aprezis lin kvazaŭ sian fraton. Ĉi tiuj vortoj liaj venis en mia memoro, farante pli abomeninda la ties bildon sur la miaj okuloj. Kiom mi volis havi lin apud mi en ĉi tiuj momentetoj kaj alkraĉi lin survizaĝen.

La patrino klopodadis konvinki min ke ŝi neniam amus homon alian tiel kiel tion ŝi faris por la patro, sed ŝi rajtis ami denove, almenaŭ ankoraŭfoje. Ke ŝi eksentis ion ankaŭ por la kalvulo, kiu helpis ŝin dungigi en la laborejo, per kies pago ni survivis dum tiuj kvin jaroj en la urbo. Ŝi okullarme diradis ke ni bezonis pri ies subtenado, ĉar, solaj, ni ne povus kunfronti tiun malfacilan vivon, kiu pli multe elprenas ol donas nin.

Ŝi ĉirkaŭbrakis kaj karesis min, kiel neniam antaŭe, kaj ŝiaj larmoj kuniĝis al la miaj, elgutintaj sur niajn vangojn. Rigardis ŝi min tiel dolorece, tiel malĝojece, kvazaŭ ŝi serĉis mian jesadon por ĉi tio, kio havis tiom ta pezo ke mi ne povus imagi tian vivon kun mia ĉiutaga kontraŭstariĝo. Ŝiaj malrapidaj fingroj karesis mian hararon, kiun ŝi ofte aranĝis mem, ne lasante min iri al la lernejo tiel malregule. Kvankam nun mi frekventis la dekan klason de la mezlernejo, ŝi zorgis pri mi kvazaŭ mi estus dujarulo.

Mia patrino, blankharulino tridektri jara, kiu neniam sin vestis samkolora al sia hararo, hezitis pri tio, kion ŝi devus fari, kiel daŭrigu plu, kiel sin alfronti al mia neado, kiel konvinki min ke tio alportus nur bonojn al ni, ke Agim estas milda kaj ĝentila, ĉar ĉiam tiel li ja estis kun mi. Ŝi ne postulis de mi ke mi amu lin samkiel la patron, sed nur akceptu kaj respektu lin kiel homo al kiu mi volus nur bonon. Ŝi estis en zorgo, kio maltrankviligis ŝin de tago al tago, ĉar ŝi ne antaŭvidis



facilajn ĉiutagaĵojn, ĉar ĉiuj homoj, ŝin konantaj, estis komencinta priparoli pri ŝiaj rilatoj kun Agim kaj tio jam disvastiĝis. Tio estis lezinta ŝian orgojlon kaj tuŝinta la ĉastecon, ĉar ŝi estis vidvino de viro, kiun la tuta urbo honorigis. Ŝi devus fari ian solvon kaj haltigi ĉi tiujn priparolaĉojn, lezinta ŝin kiel virinon, kio, laŭ ŝi, ne plaĉis ankaŭ al Agim.

* * *

Ŝia amato estis enirante en nia hejma korto, iradis tra ĝi certa kaj, per malrapidaj paŝoj, supreniris la

ŝtuparon sen sensacio, kiel kavaliro valizportanta, al kiu, havanta neniun defianton, la kastelon oni estas enmanigante kune kun la ŝlosiloj, per kiuj li, ekde nun, malfermus ĝin kiam ajn kaj kiamfoje li volus.

Mi, nerimarkite, rigardadis ilin de la fenestro de la supra etaĝo, ĝiskiam li kaj ŝi estis enirante en la hejmon kaj en la momenteto kiam ili malfermis la pordon, miaj okuloj iris al la lasta foto de la patro, farita du semajnoj, antaŭ li mortiĝus en la milito...

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (25)

DUA PARTO - LA VIVO

47



**Sen irado el la pordo
oni konas la mondon.
Sen rigardado el la fenestro
oni vidas TAŬO-n enĉielan.
Ju pli iu eliras,
des malpli fariĝas ties scio.**

**Tial la saĝulo ne eliras
kaj scias tamen ĉion.
Li ne vidas ion
kaj tamen pensas klare.
Li faras nenion
kaj tamen plenumas ĉion.**

Komento de Wang Chongfang

"Tiu ĉi ĉapitro pritraktas ĉefe la metodon kompreni la Taŭon. Laŭ Laŭzi ĉiuj estaĵoj en la universo moviĝas aŭ funkcias laŭ iaj leĝoj, kaj se oni bone konas tiajn leĝojn aŭ principojn, oni povas klare vidi la esencon de ĉiu estaĵo kaj kapti la veron de la ekstera mondo, kaj tion ĉi oni povas plenumi nur per kontemplado anstataŭ per la penado akiri praktikajn spertojn. Laŭzi neas la valoron de la funkcio de praktikaj spertoj en la konado de la mondo kaj rekomendas kontempladon, t.e. enrigardon en sian menson. Laŭ li la fundo de la homa menso estas kvazaŭ klara spegulo, kiel menciite en ĉap. 10, spegulo, en kiu la ekstera mondo estas reflektita, tial per kontemplado oni povas scii ĉion sub la Ĉielo kaj ekkompreni la Taŭon."

Cezar-komento

Jen tre interesa komento, kiu klarigas, kial Laocio tiom malagemas. Sed certe Laocio pri tiu afero ne pravas. Marks respondus la sekvan al li:

Feuerbach-tezo 2

"La demando, ĉu la homa pensado estas objektiva vero, ne estas demando de l' teorio, sed praktika demando. En la praktiko la homo devas pruvi la veron, tio estas la realecon kaj potencon, la ĉi-tiean manieron de sia pensado. La kverelo pri la vero aŭ nevero de pensado, kiu izolas sin de la praktiko, estas pure skolastika demando."

(Marks-Engels-verkoj, vol.3, paĝo 533, Dietz-eldonejo, Berlino 1969)

48

**Tiu, kiu ekzercas la lernadon, pliigas sin
ĉiutage.
Tiu, kiu ekzercas TAŬO-n, pli kaj pli malpliigas
sin.
Tiu, kiu pli kaj pli malpliigas sin, alvenas ĉe la
neagado.
Dum la neagado restas nenio nefarita.
Regi regon oni povas nur,
se oni ĉiam estas libera de tro da sindevigo.
La multokupatoj ne taŭgas regi la regnon.**

Rimarko de Cezar

Mi nun ekkomprenis dum la retradukado, ke neagado ne estas identa al nefarado. Oni povas fari ion sen tro da agademo dum tio. Tio memorigas min pri la lingva leĝo de sufiĉo kaj neceso, kiu estas grava leĝo uzata en bonstila Esperanto kaj ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj kaj sferoj. Tro da okupiteco estas ofte nur neproduktiva kaj nekreative "kurado en hamstrorado". Tro da rutino aŭ tro da agademo aŭ sindevigo mortigas la liberan spiriton. Libera spirito ne kuradas kiel freneziĝinta aĉetanto en supermarketo kaj apenaŭ povas spiri plu pro tro da hastemo. Libera spirito havas ĉiam la tempon, kiun li bezonas, egale pri kio temas. Nenio povas hastigi homon kun tia spirito, kvazaŭ kiel budha monaĥo li ĉiam tute ripozas kvazaŭ en si mem, kaj eĉ plu tiam, kiam li estas kiom ajn multokupita. (cez)

(daŭrigota)

Karaj geamikoj, karaj legantoj,
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan tradukaĵon. Temas pri novelo, eĉ mallonga romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942).



Image Irène naskiĝis en Ukraino (tiam Rusia Imperio) en juda familio, kiu parolis la francan. Kiam komencis la Rusia Revolucio, ŝi migris kun sia familio al Francio, kie ŝi iĝis fama verkistino. Arestita de francaj ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis mortigita de la nazioj en Aŭŝvico (Auschwitz).

Forgesita post la Dua Mondmilito, ŝi estas la sola verkisto, kiu ricevis la Premion Renaudot postmorte pro ŝia longa romano "Suite française" (2004).

Ŝian novelon "La Balo" mi jam tradukis en Esperanto.

(Ligiloj :

<https://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

kaj ankaŭ ĉi tie:

<https://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html>

aŭ ĉe Facebook:

<https://www.facebook.com/groups/librejo/files>)

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Koran dankon al IVAR kaj GINETTE pro la atenta legado kaj iliaj amikaj rimarkoj !
Dankon al TJERI pro liaj klarigoj.

MIKELO (Michel Dereyger)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931) (daŭrigata)

Dua ĉapitro

Ankoraŭ dum kelka tempo Tatjana Ivanovna aŭskultis la forirantan sonon de la tintiloj.

"Ili rapidas", ŝi sonĝis.

Ŝi daŭre staris meze de l' aleo, premante per ambaŭ manoj sian ŝalon sur la vizaĝon.

Leĝera kaj seka, la neĝo eniris en la okulojn kiel polvo.

La luno jam leviĝis kaj la spuroj de la glitveturilo,

kavigitaj profunde en la frostigita grundo, flagris de blua fajro.

La vento ŝanĝiĝis kaj la neĝo tuj forte ekfalas.

La mallaŭta tinto de la sonoriletoj jam ĉesis.

La abioj kovritaj de glacio krakadis en la silento kun ĝemo de homa peno.

La oldulino malrapide reiris al la domo. Kun ia peza mirego, ŝi pensis pri Cirilo kaj Jurij... La milito... Ŝi malprecize imagis kampon kaj galopantajn ĉevalojn... obusojn, kiuj disrompiĝis kiel maturaj guŝoj... same kiel sur ekvidita bildo... nu, kie ? ... verŝajne en lernolibro, kiun iam kolorigis la infanoj... Kiuj infanoj ?... Tiuj, aŭ Nikolao Aleksandroviĉ kaj liaj fratoj ? ... Kelkfoje, kiam ŝi sentis sin laca, kiel ĉi-nokte, ŝi intermiksitis ilin en sia memoro... Longa konfuza sonĝo... Ĉu, kiel antaŭe pro la krioj de Kolinka* , ŝi vekigo en la malnova dormoĉambro ?...

Kvindek unu jaroj... Tiutempe, ankaŭ ŝi havis sian edzon kaj unu infanon... Ambaŭ jam mortis... Estis antaŭ tiom da tempo, ke ŝi kelkfoje malfacile memoris iliajn trajtojn... Jes, ĉio pasis, ĉio kuŝis en la manoj de Dio.

Ŝi ree supreniris al la eta Andreo, la plej juna el la infanoj de la familio Karin, kiun ŝi devis prizorgi. Li ankoraŭ dormis proksime al ŝi en tiu granda ĉambro ĉe la angulo, kie iam loĝis Nikolao Aleksandroviĉ kaj poste liaj fratoj kaj fratinoj. Tiuj ĉiuj estis mortintaj aŭ malproksimen foririntaj.


La dormoĉambro aspektis tro vasta, tro alta por la malmultaj restantaj mebloj, la lito de Tatjana Ivanovna kaj la kuŝejo de Andreo kun ties blankaj kurtenoj kaj la malnova eta ikono alkrōĉita inter la stangoj. Ludilkofro, antikva eta skribtablo el ligno, iam blanka, kiun la pasintaj kvardek jaroj poluris kaj tinkturis de helgrizo kiel lako... Kvar nudaj fenestroj, malnova ruĝa pargeto...

Dum la tago, ĉio tio estis banata de fluo el lumo kaj aero...

Kiam venis la nokto kaj la stranga silento, Tatjana Ivanovna diris :

" Estas nun tempo, ke venu aliaj..."

Ŝi eklumigis kandelon; ĝi pli malpli lumigis la plafonon



sur kiu estis pentritaj anĝeloj kun dikaj malbelaj vizaĝoj.
Ŝi duonkovris la flamon per kartonkorneto, proksimiĝis al Andreo.

Li dormegis kun sia orkolora kapo profundigita en la kusenon.

Ŝi palpis lian frunton kaj la etajn manojn malfermitajn sur la littuko, kaj sidiĝis apud li, en sian kutiman lokon.

Nokte, ŝi restis tiel dum tutaj horoj, duonvekita, trikante, rigida pro la varmo de l' stovo, sonĝante pri la pasinta tempo kaj pri tiu tago, kiam Cirilo kaj Jurij edziĝos, kiam novaj infanetoj dormos tie. Andreo baldaŭ foriros. Kiam ili aĝis ses jarojn, la knaboj malsupreniris al la suba etaĝo, kun la gubernistoj kaj gubernistinoj. Sed neniam la malnova dormoĉambro restis senhoma.

Ĉu Cirilo?... Jurij?... aŭ eble Lulu ?

Ŝi rigardis la kandelon, kiu forbrulis kun forta kaj unutona kraketado en la silento.

Ŝi dolĉe swingis la manon kvazaŭ ŝi ekmovus lulilon.

"Mi vidos ankoraŭ kelkajn, se Dio bonvolos..." ŝi murmuris.

Iu frapetis ĉe la pordo. Ŝi stariĝis kaj mallaŭte demandis :

"Ĉu estas vi, Nikolao Aleksandroviĉ ?..."

"Jes, Njanjuška..."

"Iru senbrue ; ne veku la etulon..."

Li eniris. Ŝi ekprenis seĝon, kiun ŝi singarde metis apud la fornon.

"Ĉu vi estas laca ? Ĉu vi volas iom da teo ? Nu, mi rapide varmigis akvon..."

Li haltis ŝin.

"Ne. Lasu... Nenion mi bezonas."

Ŝi levprenis sian teren falintan trikaĵon, residiĝis kaj rapide ekmovetis la brilantajn trikilojn.

"Jam de longe vi ne venis nin vidi."

Li ne respondis, etendis siajn manojn al la ronkanta forno.

"Ĉu vi malvarmas, Nikolao Aleksandroviĉ ?"

Li remetis la brakojn kontraŭ sian bruston kun malforta tremeto.

Kiel antaŭe, ŝi ekkrietis :

"Vi denove malvarmumis !"

"Neee, oldulino mia."

(daŭrigota)

tradukis **MIKELO (Michel Dereyger)**, el Francio

Ŝercoj



— Amiko, ĉu vi scias, kiam mi ebriiĝas, mi neniun timas.

— Ĉu vi ne timas eĉ vian edzinon?

— Ne, ĝis tiel mi neniam

ebriiĝis...

— Peĉjo, vi jam malfruas la lernohoron kvinan fojon ĉi semajne. Ĉu vi scias, kion ĝi signifas?

— Jes sinjorino instruistino. Certe jam estas vendrede.

— Edzino, mi volas sciigi al vi, ke ekde nun ni vivos en multekosta loĝejo. Vi ja volis tion!

— Ho, kara mia, mi estas tre ĝoja! Ĉu ni aĉetas novan loĝejon?

— Ne, la pago por nia loĝejo plialtiĝas.





1	2	3	4	5 O	6		7	3	18	5 O	6
5	8	9	2	7 S		9	10	11	2	12 G	2
13	14	8	14		15	3	8	4	14		13
5	6	5		7	5	2	16	2		3 E	5 O
4 L	14 A		5	15	3	8	5		17	17	17
14		15	8	2	18	5		15	3	6	2
9	5 O	4	5	8	5		1 Ĉ	3	13	5	6
5	9 D	2	6	5		13	5 O	8	5	6	5

KRIPTA KRUCVORTENIGMO

Rekonstruu krucvortenigmon anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

Fonto: Semajno de Enigmoj #1

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

Du elturniĝemaj junulinoj

sendis **Ginette Martin, el Francio**

Du junulinoj (unu el ili estos kelkajn jarojn poste mia patrino) laboris kiel servistinoj ĉe bonhavaj homoj. Iun posttagmezon (ĉu ili laboris por la sama familio aŭ por du najbaraj familioj ? mi ne scias), la du junulinoj estis liberaj kaj decidis piediri kune sur la apudan monton. Piediri signifis grimpi per krutaj padoj ĝis la supro. Kaj kiam ili estis ĉe la supro, ĉu vi imagas, ke ili ripozis?

homoj, kiuj vidis paŝi tiujn fierajn junulinojn kun la florbukedoj, ne divenis, certe ne divenis, ke ili volis kaŝi malbelaĵojn, pri kiuj ili hontis. Kaj la junulinoj ridis en si mem pri la bona ideo.



verkis, desegnis kaj sendis **Ginette Martin, el Francio**

Ne, la junulino, kiu ne estis mia onta patrino, grimpis sur arbon kaj, ho ve, ŝiris sian jupon. Kelkaj momentojn poste, "akcidenteto" okazis al mia onta patrino. La menstruoj ne atendite venis, kaj la jupo de ŝi estis makulata de sango. Ambaŭ jupoj difektitaj ! Kaj sur la dorsa flanko !

- Kion fari? Ni devos trairi la tutan vilaĝon por reveni ĉe la mastrino, kaj la tuta vilaĝo ridos kaj mokos nin.

- Mi havas ideon, diris unu el ili. Ni metos niajn jupojn inverse, kun la dorso antaŭen, kaj ni plukos florojn por kaŝi la katastrofojn.

Sur la monto ne mankis grandaj genistoj kaj granda kvanto de diversaj floroj. Ili rapide faris gigantajn bukedojn.

Kiam ili revenis tra la ĉefa strato de la vilaĝo, la



Dum lastaj tagoj ĉesis pluvi kaj la tempo pliboniĝis rapide. Finfine la varma suno brilis en la hela ĉielo sen nuboj. La frostoj de la vintro ŝajnis malproksima memoro pro la ĉeesto de printempo pli malfrua ol kutime.



Petro kaj Ana marŝadis unu apud la alia por alveni al la hejmo de sia filino Katarina. Nun ili estis jam proksime. Katarina kaj ŝia familio loĝis en teretaĝa dometo malantaŭ la ĉef preĝejo, apud la bazlernejo.

Laŭlonge de la vojo Petro estis pensema. Ofte li pli malrapide paŝis por ĉirkaŭrigardi pli bone la ŝanĝojn de la urbo. Ana paroladis senĉese kun li pri iu grava temo: la naskiĝtago de ilia plej granda nepino. Ŝi timis alveni tro malfrue kaj pro tio ŝi petis ofte al la edzo pli rapidi.

Dum tiu dimanĉo la maljunaj geedzoj estis ege elegantaj. La virino surmetis rozkoloran veston kun altvaloraj butonoj kaj novajn ŝuojn. La viro, anstataŭe, survestis bluan ĉemizon, nigran pantalonon kaj la kutiman ĉapelon. Li neniam eliris de la hejmo sen sia ĉapelo sur la kapo. Ne gravis la sezono. Lia edzino ne uzis la ĉapelojn dum la vintro nek dum la somero.

Laŭ ŝi ili estis malbonegaj inventoj, kiuj servis por la sola celo: malkombi la hararanĝojn de la sinjorinoj.

Por festi la naskiĝtagon de Kristina la geavoj portis multe da donacoj; krome ili aranĝis specialan viziton al la publika ĝardeno ekster la urbo. Kompreneble Katarina kaj la bofilo Ludoviko sciis jam ĉion kaj volonte konsentis.

Dume Kristina legis en sia dormoĉambro. Ŝi komforte sidis sur la lito kaj foliumis interesan libron pri la bestoj de nia planedo. En la libro ne mankis la koloraj bildoj. "El ĉiuj bildoj, tiuj pri la birdoj estas la plej interesaj", konsideris la knabineto.

Apenaŭ aŭdiĝis la sonorilo, ŝi kuris por malfermi la pordon.

– Avo, avino! Vi alvenis!, – ŝi ekkriis, dum ili eniris en la salonon.

– Feliĉan naskiĝtagon kara nepino, – diris la

geavoj. Unu post la alia ili kisis Kristinan.

– Do, kiom da jaroj vi havas hodiaŭ? Sep? Ok? – demandis la avo.

– Naŭ jarojn!, – respondis la etulino.

– Ĉu vi estas jam tiom maljuna?

La grizaj okuloj de Kristina estis tre atentaj, tial ŝi tuj rimarkis la paketojn, kiujn ambaŭ klopodis kaŝi. – Tio estas miaj donacoj, ĉu ne?, – ŝi demandis, emociplena.

– Eble... – respondis la avo. Li ridis.

– Mi pravus, mi ne eraras, – ŝi plu parolis.

– Jes, vi divenis. La saketoj enhavas tion, kion ni aĉetis por vi, – respondis la avino.

– Kion vi atendas, fraŭlino? Vi malfermu la paketojn! – ordonis la avo al la nepino.

– En la unua paketo Kristina trovis multekostan porteblan komputilon; en la dua: brunan jupon, ne mallongan kaj ne mallarĝan.

– Ĉu vi ŝatas tion, kion mi portis por vi? – demandis la avino.

La donacoj plaĉis al Kristina, kiu, dankema, ĉirkaŭbrakis la avineton por danki ŝin.

Post tio la knabino ekmalfermis la paketon de la avo. Ŝi trovis lignan skatolon plenan je diversaj iloj por desegni. Tie kuŝis la akvareloj sub la karbokraĵoj kaj multaj folioj da papero antaŭ la lokokraĵoj.




– Vi uzu ĉi tiujn ilojn por pentri novajn pentraĵojn, – konsilis la avo al la nepino. Li sciis ke, ŝi volis iĝi fama pentristino.

“La afabla avo bone memoris mian deziron. Li ne donacis al mi sen-utilajn objektojn sed ion por helpi min”, pensis Kristina.

– Via skatolo estas belega, avo. Dankegon! – ŝi diris kun feliĉega rideto.

– Ni havas lastan donacon por vi, – anoncis la



Mallonga Historio de Filozofio (32)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Bertrand Russell (1872-1970)

Ĉu la franca reĝo estas senhara?

La ĉefaj interesoj de Bertrand Russell en teoria nivelo estis sekseco, religio kaj matematiko. Kun la unua li kaŭzis debatojn, la duan li atakis kaj al la tria li kontribuis multon. En 1929 li verkis la libron “geedziĝo kaj moralo” en kiu li traktis la temon de la kristana penso “esti fidela al la edz(in)o”. Li pensis tute la malon kaj liaj pensoj surpriziĝis la homojn. En 1916 pro liaj pensoj kontraŭ la monda milito li estis malliberigita dum 6 monatoj. Pli poste li helpis la fondadon de “Kampanjo por Nuklea Senarmigado”. Eĉ en sia maljuneco en la 1960-aj jaroj li partoprenis la fronton de manifestacioj kontraŭ milito kaj armiloj. Laŭ li “aŭ la homaro forigos la militon, aŭ la milito forigos la homaron”.

Pri religio liaj pensoj estis tre provokaj. Li diris, ke Dio tute ne savos la homaron, pro tio ni devas uzi la povon de nia cerbo. Homoj timas morton kaj tio incitas ilin alproksimiĝi al religio por trovi trankviliĝon. Estas tre trankvila afero pensi, ke Dio punos krimulojn, kiuj ne pagis sian ŝuldon dum en sia vivo. Sed laŭ li, tio tute ne vero, Dio ne ekzistas kaj religio ĝis nun kaŭzis eĉ pli da suferoj. Li pensis, ke Budismo estis tre malsimila ol Kristanismo, Islamo, Judismo kaj Hinduismo. Ĉar tiuj kvar religioj dum la tuta historio kaŭzis militojn kaj pro tio milionoj da homoj suferis kaj mortis.


Kvankam li estis pacifisto, li ĉiam estis preta militi por defendi siajn ideojn. Li devenis el aristokrata familio. Eĉ sia konduto kaj aspekto estis tia. Lia avo iam estis ĉefministro de Britujo. La ateisto John Stuart Mill (vidu TS #26) estis lia spirita patro kvankam li ne konatiĝis kun li. Legante la aŭtobiografion de Stuart Mill li fariĝis ateisto. Antaŭ tio li kredis je la “unua kialo” de Tomaso Akvino: “ĉio havas ian kialon” (rigardu TS #10) sed Stuart Mill demandis “kiu estas la unua kialo por Dio?” Se estas io senkiala, tiam le esprimo “ĉio havas ian kialon” ne povas esti ĝusta. Ambaŭ Mill kaj

Russell vivis malfeliĉajn junecojn.

Kiel filozofo lia vera intereso kaj amo estis al io inter filozofio kaj matematiko : “logiko”. Logikistoj laboras sur la strukturo de pensadmaniero kaj esprimas siajn ideojn kun simboloj. Lin precipe interesis la “teorio de aroj” ĉar ĝi ŝajnis promesplena esprimi la pensadmanieron. Sed Russell kreis handikapon al tiu teorio kiu prezentis kontraŭdiron. Tiun li eksplikis pere de sia fama paradokso-rakonto pri vilaĝa razisto aŭ per lia pli simpla ekzemplo : “ĉi tiu frazo estas malĝusta”, kiu estas paradoksa ĉar ĝi devas esti kaj ĝusta kaj malĝusta, kio estas nebla. En resumo en la teorio de aroj, kiam iu aro parolas pri si mem tiam okazas tiaj paradoksoj. Tiuj estis enigmoj kiuj ne havis facilajn solvojn, sed por Russell ili estis tre allogaj. La tiamaj logikistoj devus reinventi siajn supozojn pri la teorio de aroj.

Laŭ Russell por ke ni faru evoluon en ĉiu kampo de filozofio ni devus restrukturigi nian lingvon kaj fari ĝin pli preciza. Li trovis vojon ekspliki la interrilaton de niaj diroj kun la ekzistantaj aferoj kaj li nomis tiun la “teorio de priskriboj”. Li tre ŝatis sian ekzemplan frazon “La franca reĝo estas senhara”. Ĉu tiu frazo estas ĝusta aŭ malĝusta? En tiu tempo Francio ne estis reĝolando. Se la frazo estas malĝusta tiam devas esti iu reĝo kiu havas harojn. Se ĝi estas ĝusta tiam en Francio ja ekzistas reĝo. Li per sia rezonado montris ke la frazo estas signifoplena eĉ se ĝi ne estas ĝusta. Do, eĉ la frazo “la franca reĝo havas harojn” estas malĝusta frazo. Li tiel komencis filozofian tendecon nomatan “lingva turniĝo”.

(daŭrigota)



Unesko-Kuriero de Julio-Septembro 2018 aperis. Ĝi elŝuteblas senpage :

<http://unesdoc.unesco.org/images/0026/002652/265211EPO.pdf>

avino.

– Kiel tio eblas? Mi ne vidas pliajn paketojn, – miris Kristina.

– La plej belaj donacoj ne bezonis paketojn, – rimarkis la avo. – Mi kaj la avino volus viziti kun vi specialan ejon. Ĉu vi konas la Ĝardenon de la Rozoj?

– Ne.

– Printempe, tie kreskas bonodoraj rozoj. Meze de la ĝardeno ekzistas eĉ laĝeto, kie naĝas ruĝaj fiŝoj. Se vi volus, vi povus jam ekpentri multenombrajn aferojn tie, – informis la avo.



– Ĉu vere? Kiam ni iros tien?

– Se ni kuros al la fervoja stacio, verŝajne, ni alvenos tien je la tagmezo. La vojaĝo estos longa, sed ne tro teda, mi kredas.

– Hieraŭ mi kuiris bongustajn manĝaĵojn por nia tagmanĝo sur la herbejo. Mi plenigis korbon ankaŭ per trinkaĵoj. Mi ne forgesis viajn preferatajn kukojn, – aldonis la avino.

– Ni ekveturos ĉiuj, ĉu ne?, – demandis Kristina al la gepatroj.

– Ne, mi tre bedaŭras. Posttagmeze mi devos labori en la malsanulejo, – respondis la patro.

– Ankaŭ ne mi iros. Via frateto estas tro maljuna por vojaĝi longtempe.

– Jes, konsentite. Mi komprenas...

– Nu! Vi ne estu malĝoja, nun. Ni festos kune ĉi-vesperon, – promesis la patro.

– Jes, ni festos nur kiam vi revenos hejmen!, – certigis la patrino.

verkis **Gioia Albano**, el Italio

Fonto: <http://facila.org/?p=1742>

Gramatiko

de **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio

ANKORAŬ KAJ JAM KAJ PLU PRI ANKORAŬ KAJ JAM KAJ PLU

Ĉar ĵusemajne ni trovis, ke la signifoj de **ankoraŭ**, **jam**, **kaj plu** estas en kelkaj situacioj tre similaj, estas bona rigardi la diferencojn, kelkaj nur iometajn.



1) "Mi ankoraŭ manĝas" kaj "Mi plu manĝas" kaj "Mi jam manĝas".

Ĉe "Mi ankoraŭ manĝas" oni substrekas ke komplementa ago "manĝi" ankoraŭ ne finiĝis.

Ĉe "Mi plu manĝas" oni rimarkas ke oni daŭrigas la manĝadon pli longe ol atendite.

Ĉe "Mi jam manĝas" oni indikas ke oni manĝas pli frue ol atendite.

2) "Mi ne ankoraŭ manĝas" kaj "Mi ne plu manĝas" kaj "Mi ne jam manĝas".

Ĉe la unua frazo la manĝo tute ne komenciĝis.

Ĉe la dua frazo la manĝado simple finiĝis, kvankam verŝajne ne atendite.

Ĉe la tria frazo oni indikas ke oni ankoraŭ ne manĝas, sed substrekante la longecon de la nemanĝado.

3) "Mi ankoraŭ ne manĝas" kaj "Mi plu ne manĝas" kaj "Mi jam ne manĝas".

Ĉe la unua oni substrekas ke la manĝado komenciĝas poste..

Ĉe la dua oni substrekas la longecon de la senmanĝa atendado.

Ĉe la tria oni substrekas la fruecon de la fino de la manĝado.

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstralia Esperantisto** #385 p.4

Tombejo de japanaj kaptitoj en Ulaanbaatar

Kiam finiĝis la milito en aŭgusto 1945 restis multaj japanaj enmigrintoj kaj soldatoj en la nordorienta parto de Ĉinio (Manĉurio). El tiuj homoj 600 mil viroj estis translokitaj al diversaj lokoj en Sovetio kaj eksaj socialismaj landoj. Pri tio mi jam verkis en « Raportoj el Japanio 20 », sed ne malmultaj ne legis tiun artikolon, do mi resume reskribos la enhavon.



Post la moderniĝo de Japanio, ĝi pli kaj pli vastigis sian teritorion al Tajvano, Saĥaleno, pacifikaj insuloj, kaj pli poste al la ĉina kontinento kaj sudorienta Azio. Kiam finiĝis la milito, estis 6,6 milionoj da homoj en tiuj eksaj teritorioj. Plejparto de ili relative bonorde revenis al Japanio, sed tiuj 600 mil homoj kaptitaj en Sovetio longe ne povis reveni hejmen.

Multaj homoj kritikas kaj kulpigas Sovetion pro tio, ke ĝi kaptis tiujn japanojn kaj laborigis en sia lando severege. Sed estas aliaj homoj, kiuj argumentas alie. S-ro Saitoo Rokuroo, reprezentanto de « Asocio de eksaj kaptitoj », skribis jene en sia libro eldonita en 1995 : « Fine de la milito la japana garnizonanta armeo forkuris, postlasinte japanajn enmigrintojn. Ĝi liveris siajn soldatojn al Sovetio. Tiujn decidojn estis intence faritaj de la stabanoj de la japana armeo. Kaptitoj, tute ne sciante, kio pelis ilin al la mizera laborego, mortis senvoĉe en la fremdaj landoj ».

Post la falo de Sovetio, la rusa registaro komencis transdoni al Japanio 700 mil kartojn kaj 500 mil materilalojn pri tiuj kaptitoj. Nun familio de tiuj kaptitoj povas ricevi kopiojn de la karto kaj la materialoj kun tradukoj. Sed ankoraŭ nun 15 mil nomoj ne estas klaraj kaj 35 mil cindroj restas en la eksa teritorio de Sovetio. Oni diras, ke troviĝis du mil koncentrejoj, sed

nur 224 el ili la ministerio de bonfarto konfirmas. En Mongolio estis 16 koncentrejoj.



En la lasta tago ni vizitis eksan tombejon de japanaj kaptitoj en la ĉefurbo Ulaanbaatar. Tie estis granda cenotafo, sur kies muro estis jene skribite :

**Cenotafo de la japanaj kaptitoj.
Rememorante la japanojn, kiuj mortis inter 1945 kaj 1947 post la lasta milito kun sopiro al la patrujo, kaj esperante pacon, ni konstruis tiun ĉi cenotafon.**

**La 15an de oktobro 2001
La Japana Registaro**



日本兵士らの墓地がある 16ヶ所	
1. ダムバダルジャー	835人
2. ホジルブラン	252人
3. トブ黒ウカタル、ジラガラント	35人
4. スヘートル町	198人
5. アルフスタイ	33人
6. ショホインシアガンブラグ	10人
7. ウェルナルト	4人
8. アルタンブラグ	8人
9. ズーンハラー	44人
10. バルーンハラー	43人
11. ユルー	96人
12. バトスムベル	2人
13. ズーンブレン	43人
14. バリジド	1人
15. ウギーヌール	5人
16. ナライハ	12人

Apude estas malgranda domo, en kiu estas konservitaj fotoj kaj materialoj, ekzemple paneloj kun nomkartoj de la mortintoj (entute 290 nomoj) kaj fotoj de la eksa ĉefministro Obuĉi kaj la nuna ĉefministro Abe, kiuj vizitis tiun ĉi lokon respektive en 1997 kaj 2013. Laŭ la gvidlibro de la mongola vojaĝo ĉi tie dormas 835 homoj. En la dekstra foto montriĝas, kiom da homoj mortis en tiuj 16 koncentrejoj.

Montriĝis ankaŭ testamento de s-ro Nakamura Joŝio.

Testamento

Naskiĝinte kiel japana viro, mi jam longe decidis honore morti en bataalkampo. Karaj gepatroj kaj amikoj, dankon pro via prizorgado. Bonvolu plu zorgi pri miaj fratinoj Hacue kaj Toŝiko.

Pri detaloj, mi jam skribis al vi antaŭ ol mi eniris en la armeo. Mi ne havas ŝuldon. Du trionojn de kompensa mono el la registaro, asekurmono el bankoj kaj mia ŝparita mono iru al la gepatroj kaj unu trionon uzu por edukado de Hacue kaj Toŝiko. Bonvolu eduki ilin bone. Gepatroj, fartu bone. Mi, Joŝio, gardos vin ĝis la venko sub la tero.

Transsendu mian saluton al miaj parencoj kaj amikoj.

Koran dankon.

La 31an de januaro 1945 Nakamura Joŝio



Enkhee loĝis ĉirkaŭ ĉi tie, kiam li estis knabo. Tiam estis multaj tomboj similaj al tiu en la dekstra foto. Kiam oni

konstruis la cenotafon, oni elfosis ostojn, rekremaciis kaj transportis tiujn al Japanio.

Kiam kaptitoj fariĝis malsanaj, ili estis transportitaj al la hospitalo sub tiu monteto. Enkhee diris, ke la kaptitoj en Mongolio estis pli bone traktataj ol tiuj en Sovetio, sed laŭ la suba eseo, kiun mi trovis en interreto, ankaŭ la kaptitoj en Mongolio havis tre malfacilan vivon.

Mizerega vivo en Mongolio

Ŝioja Ŝizuo (Hiroŝimo)

La 26an de decembro 1945 ni atingis Ulaanbaataron, enpakite en arma kargotrajno same kiel pakaĵoj. Tiu ĉi estis loko en la dezerto Gobi kun ventegoj kaj flugantaj sableroj kaj la temperaturo estis minus 30~40 gradoj. Nin atendis severegaj laboroj en malvarmego kaj sen sufiĉaj manĝaĵoj, pro kio mortis 3000 homoj. Ĝis la fino de junio neĝis kaj ekde la fino de aŭgusto denove ekneĝis. Ni estis truditaj multfoje porti brikojn surdorse al la akvoturo 30 metrojn alta. Nia korpo laciĝis kiel kotono kaj la laboro estis tiel severega, ke ni preskaŭ mortis. Por produkti brikojn, ni devis knedi teron per manoj kaj metis ĝin en la kadron kelkdek fojojn tage. Pro tiu laboro la manoj krevis

kaj ruĝiĝis pro eliranta sango. Tio donis al ni grandan doloron. En tia situacio laboro pli kaj pli multiĝis.

Miaj amikoj mortis pro manko de nutraĵo kaj pro tifo el pedikoj. Ankaŭ mi suferis pro alta temperaturo de 40 gradoj, sed ne estis akvo por malvarmigi la korpon. La koncentrejo estis for de la rivero, kaj la rivero mem glaciĝis ĝis la fundo.

Ni neniam ricevis salajron. Eĉ dum la plej malvarma vintro ni devis dormi kun unn kovrilo, kiun ni kunportis de Manĉurio, kaj neniam ricevis aliajn kovrilojn.

Post sep jaroj, mi povis reveni al la kara patrujo, al la haveno Hakodate en Hokajdo, en decembro 1947.

Antaŭ la cenotafon estis granda tablo kun mapo de Mongolio, sur kiu estis montrite, kie estis tiuj 16 koncentrejoj, en kiujn estis senditaj 12000 kaptitoj kaj el ili 1600 mortis. Ni, starante antaŭ la mapo kaj direktante nin al Japanio, kantis la kanton "Hejmloko". Estis malfacile kanti glate, ĉar mi sufokiĝis de emocio, rememorante malfeliĉan vivon de la kaptitoj ĉi tie.

verkis kaj sendis Hori Jasuo, el Japanio



Samanta - anekdoto

Unu tagon viro okupiĝis pri legado de sia ĵurnalo, kiam lia edzino per rostilo ekbatis sur lian kapon.

Edzo: "Kial vi faris tion?"

Edzino: "Mi faris tion, ĉar en poŝo de via pantalono mi trovis paperon, sur kiu estis skribita la nomo Samanta."

Edzo: "Kara mia, antaŭ semajno mi iris por spekti ĉevalvetkuron kaj Samanta estas nomo de tiu ĉevalo, je kiu mi vetis."

La edzino pardonpetis lin kaj okupis sin pri hejma laboro.

Moralaĵo 1: La virinoj ĉiam konkludas tro frue.

tradukis Amir Fekri, el Irano

Post tri tagoj, kiam la viro estis spektanta televidon lia edzino ĉi-foje per granda kaserolo rebatis sur lian kapon.

Kiam la mizera viro rekonsciiĝis, demandis al sia edzino: "Kial vi batis min?"

"Ĉar via ĉevalo jam telefonis" ŝi respondis.

Moralaĵo 2: Bedaŭrinde sento de la virinoj ĉiam ĝustas



tradukis Amir Fekri, el Irano.

Miaj Esperanto-Instruistoj

Estis dum 1959-1960. Kiel studentino mi partoprenis Esperantan kurson, kies gvidanto estis docento

Georgi Dimov (1906 -1999), nia universitata instruisto. Kun humora sento, tiu homo marŝis inter la benkoj kaj la nigra tabulo, prenis kredon, kajeron aŭ alian aĵon, diris kaj skribis ĝian nomon sur la tabulo kaj igis nin ripeti kune kun li. Estis interese kiel infana ludo. Tiam doc. Dimov rakontis, ke li instruas laŭ la metodo de Andreo Cseh.



Georgi Dimov



Andreo Cseh

Mia lasta renkonto kun mia iama instruisto estis dum Julio 1986, kiam mi ĉeestis en ISEU –urbo V.Tarnovo. Li estis unu de la lektoroj. Li estis homo kun juna spirito. Dum 1988 mi legis en BE lian artikolon “La metodo de Andreo Cseh”, en kiu estis donitaj 20 konsiloj al la instruantoj. Fine doc.Dimov

skribis: “Mi sekvas strikte ĉi tiujn konsilojn kaj se vi ankaŭ sekvos ilin, vi certe ne eraros! Ja, neniu naskiĝis perfekta instruanto... Mi ofte memoras la gvidatan de mi printempan kurson en la Supera Ekonomia Instituto en Varna . En la komenco enskribiĝis 65 gestudentoj kaj geurbanoj kaj ĉe la fino ilia nombro atingis la ciferon 107! La saman rezulton mi bondeziras ankaŭ al vi, karaj gekolegoj...”



Kunĉo Valev

Dum Julio 1969 mi partoprenis kurson por instrukapablo de Esperanto. Nia kursgvidanto estis doc.Kunĉo Valev (1919-1990). Jen parto el mia hejma laboro: “Hieraŭ ni komencis E-an kurson en malgranda urbeto Godeĉ. Ni estas pli ol 40 gekursanoj en 3 grupoj: la unua – pri komencantoj, la dua – pri progresintoj kaj la tria / nia grupo/ estas supera grupo. Ni laboras kvin horojn kaj posttagmeze ni bone ripozas kaj preparas niajn lecionojn...” Jes, ni lernis de la 8-a ĝis la 13-a horo, ĉiutage. Nun, kiam mi foliumas mian kajeron, mi vidas diversajn ekzercojn, gramatikon, interesajn humoraĵojn aŭ fabelojn, kantojn... Fine li donis al ni Programon de la ekzameno kun 40 demandoj- de numero 23- metodikaj demandoj kaj de 33- Historio kaj problemoj de la E-to- movado. Mi vidas 7 konsilojn por la instruistoj.

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

Jen unu el ili: “Enirante en la klasĉambbron nepre salutu la gelernantojn kaj salutu kun rideto, demandu kiel ili fartas k.t.p.”

Kunĉo Valev estis vera instruisto, simila al la renesanculo. Li estis serioza. Kiam laboris li plenumis strikte la lernoprogramon, sed samtempe li bone konis niajn eblecojn kaj helpis al ni, se estis necese, ĉiam kaj al ĉiu li estis sincera, rideta, homeca...

Mia lasta renkonto kun doc. Kunĉo Valev estis dum junio 1990 en urbo Ŝumen, kiam okazis la 42-a kongreso de BEA. Pasante preter grupo da homoj mi aŭdis mian nomon – estis mia ekskursgvidanto, kiu post pli ol 20 jaroj ne estis forgesinta min. Estis pli maljuna, sed same tiel rideta kaj bonkora. Dum 2001-a de BE mi komprenis, ke li estis forpasinta, sed oni diras, ke la homoj estas vivaj ĝis kiam ni memoras ilin.

Doc. Georgi Dimov donis al mi la bonan komencon, doc. Kunĉo Valev- la lastan diplomon. Ambaŭ ili donis al mi la plej gravan – sian amon por la internacia lingvo Esperanto.

Estu hela la memoro de miaj Esperanto-instruistoj!

verkis kaj sendis **Elena Popova**, el Bulgario



Impresoj pri ekspozicio

-- poemo

Por kio admiri pejzaĝkolorojn
En ties floranta vivpleno?
Rigardu al floroj kaj ĝuu florojn
Sur ter', en arbar', en ĝardeno!

Kaj tamen haltigas, allogas floroj
En bildoj de veraj pentristoj,
Kaj serenigite kantemas koroj,
Sen premoj, obsedoj kaj tristoj.

Magias belego de vivaj floroj
En ĉarmo de ĉiu petalo,
Sed kial mildiĝas animdoloro
Ĉe bildoj kun simpla konvalo?

Per flor' ankaŭ bilde l' natur' karesas,
Ke iĝu pli hela la farto,
Kaj ankaŭ en bildoj siring' impresas,
Vivluma mister' de la arto.

verkis **Klara Ilutoviĉ**, el Rusio
sendis **Lenke Szász**, el Rumanio



Inter la 3a kaj la 12a de julio okazis la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), en la Nord-Karolina urbo Raleigh, en Usono. La kursaron ĉeestis 74 studentoj el diversaj ŝtatoj el Usono kaj el Kanado kaj Kolombio. La studado okazis en 4 studgrupoj. La porkomencantan grupon instruis Thomas Alexander el Usono. La eksterordinaran multnombrian kaj laŭnivele larĝan grupon de mezniveluloj gvidis Katalin Kovats el Nederlando. La partoprenintoj de la supernivela kurso dividiĝis je du grupoj, pri literaturaj temoj prelegis Anna Lowestein el Britio kaj pri movadhistoriaj temoj Antonio Jose Vergara el Ĉilio. La programon riĉigis per prelegoj kaj kontribuoj ankaŭ Renato Corsetti.



La kursprogramoj havis tri staĝantojn, kiuj spertiĝis pri metodiko kaj instruado. Raul Garcia kaj Jorge Rafael Nogueras observis kaj kontribuis je ĉiuj niveloj, dum Hans Becklin fariĝis tre aktiva kaj nemalhavebla asistanto de Katalin Kovats en la "gigant-grupo". Dum la kurso okazis ne nur lecionoj kaj seminarioj, sed ankaŭ aldonaj prelegoj kaj publikaj diskuttrondoj pri filmoj, Jutubo, Duolingo kaj aliaj temoj.

Teorie de mateno, ekde la 8h30, ĝis ĉirkaŭ la 21a horo vespere okazis programoj kun aktiva partopreno de grupoj de interesiĝantoj.



Pro la ĉeesto de Katalin Kovats, kompreneble, estis lanĉita ankaŭ KER-ekzamensesio, kaj post informprelego de Katalin, fine aliĝis entute 17 kandidatoj, kiuj en la lastaj tagoj submetiĝis al la ekzamenoj. Pro la fakto, ke la plimulto de la kandidatoj venis el la kurso de Katalin la parolan ekzamenon gvidis skajpe Marta Kovacs el Hungario, kaj ĉeeste kunekzamenis Renato Corsetti. Dum la okazigo de la skribaj partoj helpis Raul Garcia kaj Hans Becklin, kiu trejniĝis por helpi okazigi sesion en aŭgusto dum IJK en Badajozo.

La sukcesan, fakte rekordan, kursaron preparis kaj surloke manaĝis delonge kunlaboranta teamo de NASK, organizantoj, prizorgantoj, respondeculo pri la kursara ĉiutaga gazeto Naska Fasko kaj Facebook-paĝo, la plej gravaj programoj estas filmitaj de Alekso Miller kaj nun jam spekteblas en YouTube.



Interesa trajto estas de NASK, ke ĝi estas kursaro ne nur por novaj lernintoj de la lingvo, sed fakte evento, al kiu de jardekoj revenadas malnovaj kursanoj, kiuj studas en la supera nivelo kaj prenas rolojn, organizajn taskojn, kiel ekzemple aranĝo de la kulturaj programoj kaj similaj.

La konsisto de la kursanoj estas vere varia: tre junaj gefiloj de spertuloj, novlernintoj de Duolingo, jam veteranaj malnovaj NASK-uloj, kaj ankaŭ familioj kiuj kune lernas nian lingvon, lokaj esperantistoj, kiuj multe helpis al la kursanoj en praktikaj taskoj, kiel transportado kaj ĉiĉeronado.

Ĉi-jare estis interese ke la Akademio de Esperanto prezentiĝis pere de siaj 4 membroj, kio kelkfoje donis okazon por interesaj lingvaj diskutoj. Okazis ankaŭ DUOLINGO-evento dum la semajno, al kiu aperis neatendite inter la kursanoj ĝis tiam nekonataj novuloj el la urbo mem. Esperantic Studies Foundation (ESF) kiel jam tradicie multe subtenis la programon per stipendioj kaj financado de la instruistoj.



Post la rekorda kaj tre sukcesa aranĝo la teamo kaj ESF prepariĝas al la jubilea 50a NASK, kiu okazos samloke, en Raleigh en 2019.



Por la membroj de edukado.net ni menciuj, ke en la meznivela kurso Katalin helpis verki kaj realigi kun la

studentoj du skeĉojn, kiuj rilatas al kelkaj konataj instrumaterialoj, kiel Pasporto al la tuta mondo kaj Mazi, kaj aludis satire al la surlokaj kursaraj partoprenantoj, instruantoj kaj lingvaj diskutoj, sed ĉefe pri la turmentadoj pro akuzativo. Edukado.net, ties programoj Ekparolu kaj RISKO havas gravan rolon en la dua skeĉo. :-)

Se vi volas spekti la prezentojn, jen la du ligiloj al la filmoj en Jutubo. **Pasporto al la tuta mondo** kaj **Naska Fiasko**

En la jutubaj flankaj listigoj vi trovos aliajn filmitajn prelegojn kaj programojn, kies spektado ebligas ankaŭ al la neĉeestintoj kleriĝojn kaj amuziĝojn. Jen ankaŭ **la teksto** de la dua teatraĵo.

Jen **kelkaj fotoj** por sentigi la bonegan estoson de la kursaro.



Fonto: <https://edukado.net/novajhjoj?id=754>

Dido

Al I.

-- Nu, leviĝu, Dido! Via matenmanĝo estas preta. Hodiaŭ mi ne havis tempon por prepare ion specialan por vi. Morgaŭ mi dortotos vin – iris tien kaj reen ĉirkaŭ la domo avino Stefanka. Ĉu vi ankoraŭ ne stariĝis? – preskaŭ ĝin riproĉis ŝi, sed daŭre ŝi prizorgis hejman laboron. Ĝi ne abundis, sed, tamen, domo ĝi estas, ĝi bezonas ordigon – balai ĝin, lavpurigi la plankon. La polvosuĉilo difektiĝis kaj neniuj ĝin portis al la urbo por riparo. Kaj, tamen, estas pli facile per la balailo.

-- Kio okazas? Leviĝu! – jam pli kolere ŝi ĝin riproĉis – La suno antaŭ longe leviĝis alte kaj vi maldiligentas. Mi scias, ke al vi pli plaĉas la aĉetitaj matenmanĝaĵoj, sed ĉiutage tio ne eblas. Eku, ĉar mi havas ankaŭ alian laboron. Ne nur pri vi mi okupiĝas. La kokinoj same estas malsataj. Ili min atendas por nutri ilin. He, restis nur tri, sed eĉ ili sufiĉas. Po unu

Unua premio en tradukado en EKRA 2018

ovon se ili demetus,, jen estas kvin-ses ovoĵoj dum la semajno. Por sola persono eĉ ili estas multaj.

Ŝi plenigis ujon per grajnoj kaj direktiĝis al la kokinejo. Ŝi jam superis sepdek jarojn, pli ĝuste ŝi proksimiĝis al la okdekaj, se tio ne videblis al ŝi. Dum junaĝoj ŝi ĉiam laboris kaj eĉ nun ĉio prosperas ĉi ŝi. Dum ŝi estis juna, ŝi estis tre bela. Ŝin amindumis kaj pli aĝaj, kaj same malpli aĝaj ol ŝi junuloj, despli postkiam ŝi finis gimnazion en la urbo. Ŝi ne restis tie, sed revenis ĉe siaj gepatroj. Ŝi estis sola ido. Ŝia frato, pli aĝa ol ŝi per dek jaroj, forpasis jam ne fininte du jarojn pro iu epidemio. Ŝiaj gepatroj jam intencis adopti parencon infanon, kiam Dio dotis ilin per ŝi – forta kaj bela knabineto.

-- Dio, kion mi faros hodiaŭ kun vi. Dranda malemulo vi montriĝas. Ĝis kiam vi ripozkuŝos? – denove komencis ĝin riproĉi avino Stefanka. – Vidu kiel frue leviĝis la kokinoj kaj la ovo jam estas en la ovodemeta nesto. Estas per kio mi spicu la supron. Do,

hodiaŭ ili estas eĉ du. Mirinda afero! Hieraŭ – du kaj hodiaŭ ankaŭ du. Mi nehavas kokon, por ke mi pensu, ke ĝi same komencis demeti ovojn.

-- Ĉu mi ridigis vin, Dido? Nu, leviĝu!

Ŝi aĉetis por la kokinoj furaĝon miksitajn por ke ili demetu pli da ovojn, kiam ili estis sep, sed ŝi ne povis ilin utiligi. Ŝia filo loĝis en la urbo kaj ne trovis tempon veni, por vidi ŝin kaj preni freŝajn ovojn kaj ankoraŭ ion, kion ŝi kulturis en la ĝardeno. Ŝi multon ne bezonis, sed ĉu ŝi povus lasi tiun grundon nekultivitan? Peko estas! Ŝi breads ajlon, capon, tomatojn kukumojn kaj kukurbetojn, ilin ŝi plej ŝatis printempe. Kaj la infanoj malofte venis, krom somere dum la feriado. Ilin ŝi plej multe sopiris. Ŝia filino foriris al la alia rando de la mondo por serĉi laboron. Kun ŝi ankoraŭ pli malofte ŝi komunikas ol kun ŝia frato. La najbarino – Manjo, kiu venas tien ĉi dum la somero, ĉiam insistas, ke avino Stefanka instalu ian ĉu Spam, ĉu Staj. Ŝi ne sukcesis memori la nomon, sed ŝi pensas, ke ŝi ne scipovos uzi ĝin. Ne, ke ŝi estas analfabeta, sed en tiuj jaroj komenci lerni kaj se mankas instruisto, ne estas facile. Pri la vidkapablo, ŝi vidas bone, nur la koro de tempo al tempo havas apartan baton. Per tio ĝi memorigas, ke ĝi ekzistas. La kuracisto diris, ke ŝi suferaskordifekton, kiu estas ekster la ritmo. “Ja, hodiaŭ kio estas en ordo, pork e ni estu en ritmo?” – ofte ŝercis ŝi rilate sian diagnozon.

-- Ĉu hodiaŭ vi ne leviĝos? Ĉar vi kapricas, mi forprenos la bolvon – avertos ĝin avino Stefanka. – Al via avo Marin neniam mi ripetas, ke la matenmanĝo estas preta. Tuj kiam mi vokis lin, tuj li venis kaj ne estis postulema kiel vi. Multe li dorlotis vin, la malfeliĉa. Dio absolvu lin! – ŝi krucsignis kaj forviŝis la larmojn per la antaŭtuko, ĉar la naztuko restis en la alia poŝo

-- Oni min multe deziris, sed mi elektis vian avon – daŭre rakontis neflankiĝante de la ĉiutagaj zorgoj avino Stefanka. – Li estis kaj bela, kaj laborema. Li ne devenis de vilaĝo. Urbano li estis. Ni enamiĝis jam en la gimnazio. Li soldatservis, finis agronomion kaj mi ĉiam atendis lin. Li diris, k li venos postuli min de miaj gepatroj. Kaj tiel estiĝis. Li venis. Mia patro diris, ke mi estas sola infano kaj li ne permesos al mi iri al alia loko. Se li konsentas veni al mi, eblas la geedziĝo.

-- Nu, la tomatoj ruĝiĝis! Mi devas jam kolekti kaj konservi ilin por la vintro. Kukumojn mi jam pretigis. Kaj de la pasinta jaro restis. Mi donis ilin al Dailo – la cigano. La kompatinda, sep infanojn, unu de alia malpli aĝaj. Da laboro ne estas. Sed liaj infanoj ne dormas ĝis tagmeze kiel vi... Stariĝu jam! – ree komencis riproĉi ŝi Didon. – Malgraŭ ke estas ciganoj, sed kristanoj ili estas. Lia patro estis klarnetisto. Li

muzikis dum nuptoj kaj solenaĵoj en la legejo. De kie li venis kaj kiam, neniu jam memoras – ekrakontis avino Stefanka detalojn pri la familio de Dailo. – Sed lia filo ne deziris muziki. Li aĉetis ian malgrandan agron kaj per ĝi li klopodas nutria sian familion. Kiam forpasis la patro, Dailo aĉetis ankaŭ bovinon. Ĉevalon ili havis, ĉu ja eblas cigano sen ĉevalo. Kelkiam la homoj vokas lin, por ke li plugu ilian legomĝardenon, por plugi la arbarrezervejon aŭ la vitkampon. Ĉiam troveblas da laboro en al vilaĝo. Sed el la centoj da domoj nur en ĉirkaŭ dekkvin loĝas homoj. Soluloj kiel mi – esploris avino Stefanka kaj forviŝis la ŝprucintajn de ŝiaj okuloj larmojn irante por vidi ĉu Dido jam matenmanĝis.

-- Ĉu vi aŭdis, kion mi parolas al vi? Formanĝu la matenmanĝon, ĉar tagmeze nenion vi ricevos. Anstataŭ helpi, vi nur kauzas zorgojn al mi. Ebla mi sendas vin al la infanoj de Dailo, por ke vi ne kapricu multe, sed helpi por la nutrado.

La edzino de Dailo estis tre pura. La virinoj ŝin vokis, por ke ŝi helpu ilin dum purigado de la domoj. Fenestroj ŝi purigu, lavu plankokovrilojn, la ŝtuparajn kovrilojn kaj la tapiŝojn ĉe la rivero. La infanoj same helpis. La pli grandaj forportis la lakton al la proksima urbeto, kie oni serĉas la veran. La malpli aĝaj kolektis defalan paperon kaj aliajn materialojn el la ujoj por rubaĵoj. Ili ne ŝtelis, tial la homoj el la vilaĝo konsideris ilin parto de la vilaĝanoj.

Avino Stefanka rapide balais la korteton, purigis al la kokinoj, verŝis por ili akvon kaj foriris al la persikarboj.

-- Dio, ankaŭ ili maturiĝis! Mi devas prepari kompotojn. Estis same por Dailo kaj liaj infanoj, ĉar Martino ĉiam ne trovas tempon por veni kaj preni la plenajn bokalojn.

Tiele estis ĉiujare. Ŝi pretigis la vintrajn proviantojn laŭ kutime. Kion ŝi faru per tio, kio naskiĝas en la ĝardeno? Ĉu ĝin forĵetu? Martino ĉiam riproĉis ŝin, ke ŝi superflue sin engaĝas kaj lacigas per mastruma laboro. Ili sufiĉe havas kaj ne estas bezonata ŝia helpo. En la grandaj magazenoj estas ĉio. Estus bone, ke ŝi ripuzu plie. Ŝi spektu televidon kaj babilu kun la virinoj en la vilaĝparto. Sed kiom estis la virinoj en la vilaĝo? Kaj ili, same kiel ŝi, ion metis en la grundon kaj aŭtune prepares konservaĵojn por la vintro. Ili prepares, sed fine aŭ forĵetas aŭ donas ilin al la infanoj de Dailo. Dankesprime li plugis la ĝardenon, donis lakton.

Kiam estis viva ŝia edzo, ili havis kaprinon. Matene li preparis por li pankacon kaj same fromaĝon ŝi faris, ĉar li multe ĝin ŝatis. Li naskiĝis en la urbo, sed la telo kaj la brutaro plaĉis al li. Al li konvenis fosi por la brutaro, kaj same zorgi pri la junarboj. Li enplantis

ĉirkaŭ la domo vitlaŭbojn kun deserta dolĉa vinbero. Li ne emis drinki, sed glason da bona vinofortrinkis vespere kaj same por ŝi verŝis. Li almanĝetis fromaĝon. Tiel faras la francoj, diris li al ŝi. De kie lit ion scias, ŝi ne demandis. Li ne ekdeziris, ke ili iru al la urbo, kiel faris iliaj samaĝuloj, por ke estu ilia vivo pli facila kaj pli riĉa. La urbo proponis komfortojn kaj distriĝojn. Ili tion ne faris eĉ post la ŝanĝoj en la lando.

“Ĉi tie estas bone al ni” – diris li al ŝi, kiam, enlogita de la granda migrado, ŝi proponis, ke ankaŭ ili ekiru. “Mi promesis al via patro, ke ni loĝu tie ĉi kaj mi ne rompos mian promeson”. Ili, ŝiaj gepatroj antaŭ longe forlasis tiun vivon. “Lagruno nin nutras kaj ni devas zorgi pri ĝi, kaj ne lasu ĝin nelaborata. Tion, kion oni faris- antaŭ ol ili deŝiris la vilaĝanon de la tero, estas granda eraro kaj iun tagon ni pagos la pekojn. Iuj senigis la vilaĝanon el propraĵo, devo kaj respondeco esti mastro. Kaj la aliaj redonis la teron al posteularo, kiu jam perdis la senton pri respondeco – nome estiĝi mastro Pli facilas estiĝi senrespondeca ol havi zorgojn kaj ŝuldon. La unuaj pravigis sin, ke “la tero estas kapitalo (t.e. kapitalismo), sed “ĝi naskas kaj akvomelonojn kaj melonojn”* La bulgara vilaĝano ĉiam havis pecon da grundo, kiu nutris lin kaj li sentis sin libera, ĉar li estis posedanto, eĉ al la eta peco da grundo!

Enreviĝinte en siaj pensoj, avino Stefanka estis forgesinta pri Dido. Sed io eksusuris kaj ŝi pensis, ke ĝi fin fine matenmanĝis. Ŝi iris por kontroli.

-- Mi komprenas, ke ĝi ne plaĉas al vi. Leviĝu! Mi preparos por vi krespojn. Estas honto, ke vi perdigas la tempon al mi – la malpuna virino! – kaj ŝi ekiris al la kuirejo.

-- Kun kiom da ovo mi faru ilin? – irante demandis ŝi. Poste io knaris. Sekvis dolora ĝemo kaj frapo fe falanta objekto. La reĥo forportis ĝin al la ĝardeno. Poste ĝi silentiĝis kaj ekestis silento.

Subite la hundo ekbojis kaj eksaltis. Ĝi ne estis ligita. Ĝi enkuris en la kuirejon, komencis flari kaj post kelkaj sekundoj ĝi komencis terure hurli kaj rigardi al la pordo.

Sur la flanko kuŝis avino Stefanka. Je unu metro apud ŝi ruliĝis la eta kaserolo, en kiu ŝi kirlis la miksaĵon por la krespoj. Ŝiaj okuloj larĝe malfermitaj, rigardis al la malplena spaco. La hundo, kiu de tiu mateno kaŭzis al ŝi multajn zorgojn, bojis kun rigasdo al la pordo.

Kiam forpasis ŝia edzo, oni forvendis la kaprion kun la kapridoj, la porketon, malpli igis la birdojn. La katon prenis Manjo, la najbarino. La filo de avino Stefanka volis veturigi la hundon Dido ien malproksimen, ekster la vilaĝon kaj tie lasi ĝin, por ke ĝi ne reveni. Neniu volis ĝin preni. Ŝi esploris. Ĝin ŝia

edzo kreskigis de ethundo. Ŝi ĝin ne donis kaj insistis, ke ŝia filo lasu ĝin. Por kunulo, por havi kun kiu paroli.

-- Kio okazas, Dido? – transpasis la sojlon Manjo, la najbarino, kiu loĝis je distanco de 5-6 domoj de avino Stefanka, sed, ĉar en la vilaĝo regis silento aŭdiĝis de tiu ĝis la alia rando. – Dido, kion.....? ne findiris la demandon Manjo, viginta sur la tero la mastrinon de la domo. Ŝi ŝanceliĝis kaj sin apogis je la muro. Dido lekis la vizaĝon de avino Stefanka kaj malĝoje rigardis la najbarinon. Poste ĝi iris al la alia flanko, kun rigardo al la pordo kaj komencis plorĝemi. Ĝi kuŝiĝis apud ŝi kaj metis sian kapon sur ŝia brusto.

-- Halo, halo, ĉu estas la Urĝa helpo? – la tremanta voĉo de Manjo apenaŭ surdigis la bojadon de la hundo.

-- Diru!

-- Tie ĉi.....

-- Kia estas tiu hundo, kiu tie bojas?

-- Dido, ĉesu boji! – provis trankviligi la hundon la najbarino kaj en la telefono ŝi daŭrigis klarigi. – Iu virino, la najbarino senkonsciigis. Ŝi senmove kuŝas sur la tero. Mi petas vin sendi....

-- Atendu, mi vin transligos, – kaj la telefono silentiĝis.

-- Dido! Dido, ŝi ŝajne ne spiras..Kaj ĉesu boji! De vi mi ne povas aŭdi. Jes, mi telefonas por urĝa helpo, devas...

-- De kie vi sonoras? – oni ŝin ĉesigis denove. – Kio okazis? Kia estas ŝia stato? De kie ŝi malsanadas? Ĉu ŝi havas altan sangpremon? Kiom da jaroj ŝi havas? Kiu renkontos la skipon? – sinsekvis aro da demandoj, al kiuj Manjo apenaŭ sukcesis respondi kaj ĉiam provis diri, ke la filo de avino Stefanka loĝas en la urbo kaj mankas zorganto pri ŝi. Oni ne povas lin malkaŝi.

-- Ni sendas al vi malsanulveturilon, sed en la momento ni ne havas liberan skipon. Vi atendos! – kaj sur la ekrano aperis “La interparolo ĵus finiĝis”

-- Dido, ili ĝis kiam.....Manjo esploris.. – kaj Martin same ne aŭdigas sin, – ekvidis ŝi apud la hundo, nesciante kion fari, kiun serĉi. Ŝi estis la malplej maljuna en la vilaĝo. La viroj jam maljunaj kaj malfortaj, dubinde per io povus helpi ŝin.

La malsanulveturilo alvenis post unu horo. La medicinisto, kun teko enmane, transpasis la sojlon de la kuirejo, sed ĉi tie Dido renkontis lin per bojado kaj ne volis lasi lin eniri. Li subite saltetis, turniĝis kaj pretis forlasi la ĉambreton.

-- Atendu! – ekkriis la najbarino. – Dido, ĉesu! Venu tien ĉi!

Per komunaj klopodoj ili sukcesis trankviligi la hundon. La medicinisto metis la manon je la aorto de avino Stefanka, kiu kuŝis tiel sur la tero kun rigardo al

la malplena spaco. Li paŭzis sekundon kaj poste nee skuis kapon.

-- Jam estas malfrue! Ŝi mortis antaŭ duona horo. Ŝin atakis apopleksio. Dio absolvu ŝin!

Ŝin adiaŭis deko da samvilaĝanoj ĝis ŝia eterna loĝejo. Ŝia filino ne sukcesis veni. Ŝia filo genufleksis apud la tombo kaj restis tie longe post la lasta preĝo. Li petis pardonon!

tradukis **Georgi Mihajlov**, el Sofio

* курник - kokinejo

* полор – ovodemeta nesto

* "Мир на страха ни" - "Paco al nia timo" Georgi Mišev

--- oOo---

Unua premio en la traduko de la rakonto "Dido" el le libro de Iv. Maĝarova "Sortoj sur vojkruciĝo" en la konkurso EKRA 2018

EKRA- 2018 en Razgrad, Bulgario por 29a fojo La 01an – 03an de junio en Razgrad, Bulgario okazis

por 29a fojo jam tradicia Esperantista Krea Renkontiĝo "Abritus", organizita de la Esperantista Domo pri kulturo "D-ro Ivan Kirčev". En la programo de la festo estis prezentita plej nova libro de Ivanička Maĝarova "Sortoj sur vojkruciĝo" kaj estis anoncitaj la rezultoj de la du konkursoj – la Internacia konkurso por originala esperanta poezio kaj humuro kun prezidanto de la ĵurio Venelin Mitev – elstara bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, esperantisto kaj ĵurianoj: Josip Pleadin – elstara kroata verkisto, eldonisto, esperantisto kaj Ivanička Maĝarova – longjara esperantistino kaj verkistino; La dua konkurso por traduko el bulgara okazas por 5a fojo. Ĝia ĵurio konsistas el: Marina Kumanova – prezidanto, denaska esperantistino kaj instruistino, D. Kateva – instruistino, filologo kaj M. Georgieva – multjara esperantistino, instruistino. Partoprenis 12 personoj el 6 landoj.

sendis por nia revuo **Dimitrinka Kateva** prezidanto de la Esperantista Domo pri kulturo en Razgrad, Bulgario

Elpensi rakontojn ĵetkube

-- de Hoss FIROOZNIJA, el Usona Esperantisto

Ekzistas pluraj ludoj, en kiuj oni kreas rakontojn surbaze de hazarde elektitaj bildoj. Furora ekzemplo estas la anglalingva kartludo **Once upon a time**: sur ĉiu karto aperas ilustrita vorto rilate al fabeleca temo, ekz. princino, sorĉado, ringo, ks. Ludantoj provas elpensi fabelon uzante la manplendon da kartoj, kiujn ili ricevas.



Rory's Story Cubes

Ne mallonge post populariĝo de la anglalingva originalo, esperantistoj tradukis ĝian regularon. La rezulto, **lam estis...** nun havas propran paĝon en la

Esperanto-Vikipedio (https://eo.wikipedia.org/wiki/lam_estis...). Tamen ankoraŭ restas granda defio por ludantoj: manko de esperantigitaj kartoj. La plej diligentaj ludemuloj tradukas kaj presas siajn proprajn kartojn, sed kompreneble tia solvo ne konvenas por ĉiuj.

Simila – sed pli simpla – ludo estas Rory's Story Cubes. Ĝia ekipaĵo estas elegante minimuma: entute nur naŭ ĵetkuboj, nete nestitaj en portebla uĵeto. Sur la flankoj de ĉiu kubo aperas po unu abstrakta bildo (piktogramo), ekz. de okulo, seruro, horloĝo, demandosigno, ktp. Aperas nur bildoj, sen vortoj; do la ludo jam bone konvenas al Esperanto, elskatole!

La simpleco de la bildoj povas instigi kreemon, ĉar kutime eblas elpensi por ili plurajn signifojn.

Ekzemple, abstrakta bildo de pomo povus signifi ne nur la frukton mem, sed ankaŭ manĝaĵon pli ĝenerale. Aŭ komputilon. Aŭ ion malpermesitan. Aŭ Novjorkon (la "Granda Pomo"), aŭ eĉ graviton (pensu pri la legendo pri Isaac NEWTON)... kaj tiel plu.

La regularo estas same simpla kaj fleksebla. La kreintoj donas tri skizajn proponojn, konsilante ke oni adaptu ilin laŭplaĉe:

1. Laŭvice, ĉiu ludanto ĵetas naŭ kubojn kaj provas elpensi rakonton kiu kunligas la supre montratajn bildojn.
2. Iom pli defie: laŭvica ludado kiel en (1), sed antaŭ ĵetado oni devas elekti temon/titolon por la rakonto, ekz. "Mia bela sonĝo" aŭ "Mia freneza vojaĝo".

3. Kunrakonta ludo: unu ludanto prenas kubon el la ujo, ĵetas ĝin, kaj komencas rakonton per la supre montrata bildo. Tiam laŭvice, en rondo, ludantoj prenas kaj ĵetas po unu kubon kaj provas daŭrigi la rakonton. La ludo finiĝas kiam la kuboj elĉerpiĝas.

Sendube oni povus krei kartaron kun 54 piktogramoj sen multe da laboro, do ne vere necesas aĉeti ĵetkubojn. Tamen la kuboj estas aparte ĉarmaj, kun tre plaĉa – kaj tuŝinda – aspekto; ili kvazaŭ invitas onin al ĵetado kaj ludado. Kaj, almenaŭ je la eldonto de tiu ĉi artikolo, ili malmulte kostas: nur \$8 ĉe Amazon (<https://amazon.com/dp/B003EIK136/>).

Fonto: **Usona Esperantisto**, 2018:1 (jan-feb)

Neniu rolo havas tiom gravan rolon en filmoj kiel DNA. Ĝi estas uzata por trovi la krimulon, por revivigi dinosaŭrojn, aŭ por igi kutiman homon superheroo. Kvankam multaj el tiuj filmoj senpardone troigas la sciencan realecon, ili ofte baziĝas sur kerno de vero. La realeco tamen, povas esti multe pli mirinda ol filmoj. Kio DNA estas tamen kaj kiel modifi ĝin povas ŝanĝi organismojn?


DNA kiel molekulo

DNA estas granda, biologia molekulo. Estas malfacile imagebla kiel molekulo povas enteni genetikajn informojn, sed DNA estas ege kompleksa. Kutime, molekuloj havas fiksan strukturon, kiu ĉiam samas. Akvo ekzemple, konsistas el unu oksigena atomo kaj du hidrogenaj atomoj en fiksa Angulo. DNA uzas la fakton, ke karbono povas krei ringojn kaj ĉenojn al sia avantaĝo kaj tiel formas molekulon, kiu enhavas miliardojn da atomoj. Grandskale, la strukturo aspektas kiel ŝtuparo kiu rondiras kiel helico. La ŝtuparo mem estas kreita el sukeroj kaj fosfatoj, kiuj donas strukturon al la molekulo. Inter la ĉenoj troviĝas paroj de nitrogenaj bazoj, kiuj reprezentas la veran kodon. Kune, la sukero (desoksiriboza), fosfato kaj nitrogenan bazo kreas polimeron (molekulĉenon), kiu nomiĝas **DesoksiriboNukleata Acido: DNA**.

Kio plej gravas por kompreni la kodon de DNA estas la nitrogenaj bazoj, ĉar ili estas la "literoj" el kiu la kodo konsistas. DNA enhavas kvar malsamajn nitrogenajn bazojn. Iliaj nomoj estas mallongigataj al **A, C, G** kaj **T**. Pro tio ke A kaj T povas krei du ligojn, ili ĉiam estas trovataj kune, dum C kaj G, kiuj formas tri ligojn estas la alia paro. Tiel unu flanko de la DNA surhavas ekzakte la malon de la kodo de la alia flanko. La fakto ke DNA konsistas el du malaj ĉenoj gravas por la kopiado de la informoj, ĉar por tio oni duonigas la DNA kaj kreas du apartajn ŝablonojn. Aliaj molekuloj puŝas nitrogenajn bazojn kontraŭ tiuj strioj kaj nur se ĝi havas la ĝustan kvanton de ligoj, la bazo konektiĝas. La ĥemiaj kvalitoj de DNA kaj ĝiaj bazoj do sufiĉas por krei sistemojn kiuj kopias DNA.

De geno al proteino al organismo

Genetikaj informoj troviĝas en la genoj. Geno ne estas aparta fizika molekulo, sed parto de la DNA-molekulo. Oni povus diri ke genoj estas kvazaŭ frazoj en la kodo, kiuj komenciĝas per majusklo kaj punkto. Pli laŭvorte tio signifas ke genoj komenciĝas kaj finiĝas per fiksaĵ sinsekvoj de bazoj, por ke la



^ Ĉi tio estas nur eta parto de la DNA molekulo

molekuloj kiuj kopias la DNA scias kie ili komencu la kopiadon. Ofte oni parolas pri genoj kiuj respondeblas pri okulcoloro, kiom facile muskoloj trejniĝas aŭ kiom agresema iu estas, sed ĝenerale tiaj ecoj estas tre kompleksaj kaj influataj de pluraj genoj. Anstataŭe, genoj plej ofte priskribas specifajn proteinojn. Tiuj estas grandegaj molekuloj kun specifaj taskoj en la korpo. Proteinoj povas doni strukturon al la ĉelo, faciligi transporton de molekuloj, aŭ plirapidigi ĥemiajn reagojn per kunigi molekulojn. La diverseco de proteinoj estas nekredebla kaj tute dependas de la strukturo de la molekulo. Kiam la kodo en la DNA do ŝanĝiĝas, la strukturo de la proteino povas ŝanĝiĝi, kio povas influi kiel la organismo aspektas aŭ funkcias.

Kiel tiom kompleksa molekulo povas esti priskribata de tiom simpla kodo tamen?







^ Jen ekzemplo de la strukturo de proteino. Ĉi-kaze temas pri papaino.

Proteinoj kreiĝas el molekuloj, kiuj nomiĝas aminoacidoj. En biologio, dudek aminoacidoj estas uzataj, kiuj ĉiuj havas malsamajn kvalitojn. Ĉiu aminoacido havas unu aŭ plurajn kodojn. Glicino ekzemple, la plej simpla aminoacido, povas esti priskribata per la kodoj **GGU, GGC, GGA** kaj **GGG**. (ke la kodo enhavas U anstataŭ T rilatas al la kopiado de la DNA.) Tiuj trilateralaj kodoj nomiĝas **kodonoj** kaj se la nitrogenaj bazoj estas la literoj de DNA, kodonoj estas la vortoj. Por konstrui proteinojn, la geno kiu priskribas ĝin estu kopiata. Skipo de proteinoj respondecas pri la kopiado de DNA. Ĉi-kaze la rezulto de tiu procezo ne estas identa DNA-molekulo, sed molekulo de **RNA**. Tiuj molekuloj strukture multe similas al DNA, sed la gravaj diferencoj estas ke ili ne venas en paroj (nur unu ĉeno de sukero kun unuopaj bazoj) kaj ke ili uzas la bazon U anstataŭ T. RNA molekuloj estas multe pli etaj kaj kompakta ol DNA kaj do povas eskapi la ĉelkernon por iri al la ribosomoj, kie proteinoj kreiĝas. **Ribosomoj** estas etaj "maŝinoj" en la ĉelo, kies tasko estas la ligado de aminoacidoj. La RNA eniras en unu flankon, kie kompleksa ĥemia sistemo legas la kodonojn kaj lasas nur la korespondantajn aminoacidojn ligi sin al la ĉeno. La ĉeno de aminoacidoj eliras de la alia flanko de la maŝino, kie ĝi faldiĝas por iĝi proteino. Pro la forta ligo inter DNA kaj proteinoj, etaj ŝanĝiĝoj en la kodo de la DNA povas kaŭzi grandajn ŝanĝojn en la organismo. Oni povus eĉ diri ke evoluo okazas el la perspektivo

de DNA kaj proteinoj kaj ke la organismo mem estas nur ilo. Konkreta ekzemplo de tia molekula evoluo estas ke la proteinoj el kiuj kornoj, ungoj kaj haroj estas faritaj fakte estas pli-malpli la sama proteino. Tiu proteino nomiĝas keratino kaj konsistas el pluraj helicoj de aminoacidaj ĉenoj. Unu specifa aminoacido, **cisteino**, povas krei fortajn ligojn kun aliaj cisteinaj grupoj per sia sulfura atomo. Tiuj ligoj estas grava parto de la tridimensia strukturo de la proteino kaj ili donas forton. Homoj kies haroj enhavas malmulte da cisteino en sia keratino, havas tre flekseblajn, molajn harojn, dum homoj kiuj havas multe da cisteino havas malmolajn harojn. Kiam la keratino havas eĉ pli da cisteino, ĝi povas iĝi ekzemple korno. Multe pli da proteinoj tiel interriltas kaj oni eĉ povas uzi la etajn diferencojn inter la proteinoj kiuj troviĝas en malsamaj organismoj por eltrovi kiel tiuj organismoj evoluis.

Aliaj pecoj de DNA havas pli kompleksajn rolojn tamen, kiujn oni ankoraŭ ne tro bone komprenas. Tre interesa kaj aktuala ekzemplo estas priskribata de la scienca kampo de "Evo Devo" kaj temas pri pecoj de DNA kiuj gvidas la embrianojn kreskon. Per ŝanĝi la sinsekvon de tiu DNA oni povas krei organismojn kies korpopartoj troviĝas en la malĝusta loko, sed tute bone funkcias. La DNA do priskribas la lokon de iu korpoparto, sed ne kiel ĝi aspektu. Tiuj funkcioj de DNA estas tamen multe tro malsimplaj por priskribi ĉi tie.




DNA kaj medikamentoj

Nekredeble multaj malsanoj rilatas al DNA kaj proteinoj. La Alzheimer-malsano ekzemple estas ligita al la formiĝo de aroj da gluemaj proteinoj en la cerbo (Oni ne konsentas pri ĉu tio estas kaŭzo aŭ simptomo). Kancerroj estas la rezulto de ŝanĝiĝoj en la DNA kiuj igas ĉelon senfine dividi sin kaj virusoj estas rekonataj pere de antikorpoj, kiuj ankaŭ estas proteinoj. Bona kompreno de ĉi tiuj molekuloj do estas esenca por batali

[^] Ĝenerale proteinoj konsistas preskaŭ nur el ĉi tiuj 20 aminoacidoj. La bazo ĉiam samas, por ke ili povu formi ĉenon.

kontraŭ tiuj malsanoj. Diversaj teĥnikoj estas uzataj por fari tion kaj kelkaj estis freneze sukcesaj. Multaj homoj kiuj havas diabeton produktas malpli aŭ neniun insulinon. Tio estas proteino kiu gravas por malaltigi la koncentriĝon de glukozo en la sango. Historie oni uzis porkan insulinon por batali kontraŭ la malsano, sed akiri la insulinon estis malfacila kaj pro tio ke la insulino de porkoj estas iomete malsimila al tio de homoj (diferenco de unu aminoacido), la imuna sistemo povas severe reagi al ĝi. Hodiaŭ oni povas sufiĉe facile enmeti DNA kun specifaj genoj en bakteriojn kaj igi ilin krei la proteinojn kiujn oni volas. Tiel oni povas krei homan insulinon per bakterioj, kiujn oni povas facile kreskigi. Same oni uzas la DNA de kanceraj ĉeloj por vidi ekzakte kio paneis kaj kion oni povas fari kontraŭ la kancero de unu specifa persono. Ĉi tiaj teĥnikoj gravas, pro tio ke ĉiu kancero havas estas unika, do trovi universalan medikamenton estas preskaŭ nebla. Alia teĥnologio kiu promesas multon estas la CRISPR/Cas9 sistemo, kiu origine venas el bakterioj. Ĝi funkcias iusence kiel imunsistemo, ĉar la bakterion uzas ĝin por englui la genetikajn informojn de virusoj, kiuj atakis ĝin antaŭe, en la DNA. Tiel la bakterio povas rekoni la materialon kiam simila viruso atakas ĝin estontece kaj batali kontraŭ ĝi. La proteino kiun la bakterio uzas por fari tion estas ege bona kaj preciza tondilo. Pro tio ke ĝi estas multe pli preciza ol aliaj metodoj de ŝanĝi DNA, esploristoj uzas ĝin por laŭplaĉe tranĉi DNA kaj eventuale meti alian pecon de DNA en la truon. Estontece oni esperas solvi multajn genetikajn problemojn tiel kaj en la laboratorio oni jam faris sufiĉe imponajn paŝojn.



^ Doni genojn al bakterioj sufiĉe facilas. Ĉi tiuj bakterioj ricevis biolumineskan genon de meduzo.

Ludi la rolon de Dio

Ekde kiam genetika modifado signifis ke oni tiom longe pafis plantojn per radio ĝis unu ekhavis novan econ, scienco multe progresis. Oni povas nun freneze rapide legi la kodon de DNA, tranĉi ĝin kaj aldoni la genojn de tute malsamaj organismoj. Oni eĉ iomete sukcesis krei proprajn kodojn (estas konkurso pri tio por universitatoj). Tio ebligis la kreadon de novaj plantoj kiuj kreskas en malbonaj kondiĉoj aŭ produktas pli da fruktoj, aŭ bestoj kiuj pli simple kreskigeblis. Unuflanke tio jam okazis dum miljaroj per la selektado kaj hibridigo de rasoj, sed aliflanke la eblecoj donas pli da respondeco ol iam antaŭe. Eksperimentoj en biologio iĝas pli kaj pli avancintaj kaj igas onin pensi pri la etiko de DNA-modifado. Ĉu modifitaj manĝaĵoj estas vere pli sanigaj ol nemođifitaj manĝaĵoj? Ĉu oni rajtas komerce posedi DNA-kodon? Ĉu kreskigi insektojn kun kruroj sur la kapo aŭ musojn kun homaj organoj sur la dorso estas etika? Feliĉe ĉi tiaj demandoj estas multe pripensataj kaj ĉiu universitato kiu faras tiajn eksperimentojn havas etikan komitaton. Specife kiam temas pri homoj, la demandoj iĝas komplikaj. Ĉu oni rajtas modifi la genojn de nenaskita homo? Multaj homoj kontraŭas tion, sed kio se oni modifas la gepatrojn kaj la infano heredas modifitajn genojn? Nun ambaŭ ekzemploj ŝajnas kiel problemo por poste, sed oni demandas sin similajn demandojn hodiaŭ. Oni jam povas detekti diversajn genetikajn malsanojn antaŭ la nasko kaj devas decidi ĉu oni daŭrigos la gravedecon. Historie tiaj decidoj okazis eĉ post la nasko. El tiu perspektivo modifado estus por multaj homoj pli etike justa ol abortigo. Aliflanke nenecesa modifado ŝajnas al multaj homoj multe pli problema, sed ĉu oni ne povus diri ke ne doni la plej bonajn genojn al infano estus same maljusta kiel doni malbonan edukon al ĝi? Ĉi tiuj demandoj ne nur gravas por sciencistoj, sed ankaŭ por ĉiuj aliaj. Ju pli scienco progresos, des pli la demandoj iĝos relevantaj. Gravus do ke oni komprenu pri kio la scienco fakte temas. Tio, kio estas fremda estas timiga kaj kiam oni timas progreson, ankaŭ la avantaĝoj ne realiĝas.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/05/30/malcifri-la-kodon-de-dna/>

Salutmesaĝo de Unesko al la partoprenantoj de la 103-a UK

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio.



Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruĉiĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

Lingvoj estas la vektoro, kiu ebligas tiun dialogon; ili konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas konkretigi, kaj same por defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias nuntempe, ke ili malaperas en ritmo de unu malapero dufoje monate. Tio estas giganta perdo por la homa heredaĵo. Ni devas plie defendi plurlingvismon en la

instruado per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la Reto, tiel ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco en ĉiuj homgrupoj. Gravas, ke ĉiu sukcesu esti en kontakto kun sia historio, sia identeco kaj la simbolaj resursoj de sia origina etno.

Tiu agado de Unesko ankaŭ estas VIA agado. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto. Ĝi ebligas ekziston de homgrupo de parolantoj sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas alten iri kaj atingi kosmopolitikan konscinivelon, esti mondĉivitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn.

Via elektita temo por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?"

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn. Defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado.

Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan.

"Multaj voĉoj, unu mondo" – jen la slogano de nia fame konata organo Unesko-Kuriero.

"Multaj voĉoj, unu mondo", tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas – kaj kiu staras sur la versio de nia revuo, kiu nun aperas en Esperanto: Unesko-Kuriero.

Finfine mi volas transdoni, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn pri la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay,

Ĝenerala Direktorino de Unesko

Lisbono, la 29-an de julio 2018

Fonto: **Gazetaraj Komunikoj de UEA**, N-ro 744, 2018-08-06

Kiam ili atingis densaĵon, la malgrasa lupo komencis rakonti:

- Fratoj miaj! Mi apenaŭ postvivis. Apenaŭ mi eniĝis, la forĝisto tiel martelbatis min surkape, ke ĉio en miaj okuloj duobliĝis. Iu alia trapikis mian flankon per du pikiloj kaj subite aperinta tajloro tondis miajn gambojn. La virino apenaŭ elboligis miajn okulojn kaj la infanoj forrompis mian voston kaj disŝiradis mian felon. Sed la plej kolera estis la mastro de la domo, kiu senĉese kriegis: "Donu lin al mi! Donu lin al mi!"

Ne, neniu min tien plu enlogos, eĉ se mi estu tentata per bongusta kuko. Mi per tuta majlo ĉirkauxiros la domon.

Ĉiuj lupoj konsentis kun li, ke la arbara dometo je granda distanco devas esti ĉirkaŭirata.

<<<

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el Litovio

-- oOo --

V

ulpo vizitis kapron kaj diris:

- Iru ni al la arbaro por konstrui domon. Oni parolas, ke estos grandaj frostoj.

La kapro konsentis kaj ili ambaŭ komencis la konstruadon.

Jen subite kaj tute neatendite venis koko por spekti, pri kio la vulpo kaj la kapro okupas sin.

- Vi ne spektu, sed eku al la laboro kun ni, - diras al li la vulpo. - La vintro venos kaj vi frostiĝos.

- Nu, vi ne atendu min! - respondis la koko. - Mi profunde enmuskiĝos kaj ne frostiĝos.

Li turnis sin kaj foriris.

Baldaŭ alkuris porko.

- Helpu labori al ni, - invitas lin la kapro. - Vintro jam alkuras. Vi povos varme vivi kun ni kaj nenion timi.

- Ne bezonas mi viajn konsilojn, - respondjetis la porko. En la teron mi rostrofosiĝos kaj travintriĝos. Kiam la porko forkuris, tuj ansero alpaŝis.

- Ek al la helpo, amiko, - invitis lin la vulpo. - Vi kunlaboros en la konstruado de la domo kaj ni ĉiuj varme travintros.

- Sub mia plumaĵo mi sentas sufiĉe varme, - fiere respondis la ansero.

Post ioma tempo alsaltkuris leporo. Kiam la kapro invitis lin al la laboro, la leporo ekkriis, ke lia vilo estas tre densa kaj li ne timas froston.. Li turnis sin, kaj neniu plu lin vidis.

La kapro kaj la vulpo, daŭrigas konstruadon, urĝas, ĉiujn invitas por helpi ilin, tamen neniu konsentas. Ili laboris, laboris kaj jen bonega domo estis konstruita. Kaj ambaŭ ekloĝis tie.

Venis la vintro. Ekstere oni ne povas elteni malvarmon kaj grandajn frostojn.

Tuj alkuris al la dometo la koko kaj ekpetis por ke li estu enlasita por varmiĝi.

- Vi ja diris „Mi profunde enmuskiĝos kaj ne

frostiĝos.“ Kial do vi ne enmuskiĝas?

Vidas la koko, ke la situo estas malfavora, do li ektimigis la vulpon kaj la kapron.

- Nu, se vi ne lasas min enen, mi malkovros la fundamenton kaj vi ambaŭ frostiĝos.

Ili enlasis la kokon kaj jam loĝas ili trio.

Baldaŭ aperis ankaŭ la ansero.

- Enlasu min, vulpeto, enlasu min kapreto. Mi jam preskaŭ mortfrostis.

- Do, vi diris "Sub mia plumaĵo mi sentas sufiĉe varme - mi ne timas".

- Lasu min en urĝe, - koleras la ansero. - Se vi ne enlasos min, mi eltiros la muskojn el inter la murtraboj kaj vi ĉiuj frostiĝos.

Ili enlasis la anseron kaj jam estas kvar loĝantoj.

Tuj alkuris la porko kaj frostskuante petas esti enlasata.

- Enlasu min, fratetoj. Mi jam ne povas trasuferi la froston.

- Vi, do diris „En la teron mi rostrofosiĝos kaj travintriĝos“. Kial do vi ne rostrofosiĝas en la teron?

- Se vi ne enlasos, mi subrostrigos la fundamenton kaj vi ĉiuj frostiĝos.

La porko estis ankaŭ enlasita. Loĝas ili kvinope.

Kiam la frosto eĉ plie ekpremis, alkuris la leporo.

Kaŭras li ĉe la pordo kaj ploraĉas:

- Enlasu min, karuloj. Kompatu min!..

- Diris vi, ke via vilo estas tre densa kaj vi ne timas froston...

- Se vi ne enlasos min, mi tuj disfusetos la fundamenton kaj vin atendas mortfino, - timigas ilin la leporo.

Estis enlasita ankaŭ li. Jam vivas ili sesope. La vivo en la dometo estas varma, agrabla kaj ĉiuj bone konkordas.

En la arbaro estis multe da lupoj kaj la frostegoj ne ĉesis. Frostas la lupoj, malsatas. Vagkurante tra la arbaro ili trovis la dometon de la vulpo kaj de la kapro, sed ili neniel povas eniĝi. Ili provis iel kaj aliel, sed neniu malfermis la pordon por ili.

Tiam la plej malgrasa vulpo trafenestriĝis en la dometon. Apenaŭ la lupoj sukcesis eniĝi, la kapro batbat per siaj kornoj en lian frunton kaj en la flankon. La vulpo kaptis la kaldronon kun varmega akvo kaj verŝas ĝin en la okulojn de la lupoj. La ansero pinĉadas liajn gambĉaĵojn, la leporo ŝiras lian felon, kaj la porko tiras lian voston. Dume la koko sur la stangeto sidante ekkriis per terura vĉxo. La lupoj ekteruriĝinte ĵetis sin al la fenestro, kun grandaj penoj trapenetris eksteren kaj kuregis al la arbaro. Lin postsekvis ankaŭ aliaj lupoj.

Facilaj rakontoj

La manoj de Gbeglo Koffi

Mi ofte manĝas kun mia filino Aminda. Iam, dum la manĝado, ŝi rigardis min kaj diris: "Fi, Koffi, vi manĝas per la maldekstra mano. Ankaŭ mi tiel faru." Mi respondis: "Ne faru tiel, ĉar mi manĝas kiel vi, ne per la maldekstra mano, sed per la dekstra." Ŝi tute tion ne kredis. Poste ŝi sidiĝis antaŭ mi kaj ni manĝis el la sama telero.

Kiam du homoj sidas vizaĝ-alvizaĝe, la dekstra mano de unu kaj la maldekstra de alia troviĝas ĉe la sama flanko. Tiel Aminda kredis, ke mi manĝas per la maldekstra mano.

Nun la probemo estas:

"Ĉu oni ne manĝu per la maldekstra mano?"

En nia medio la maldekstra mano estas ege malŝatata. Ĝi faras malbelajn agojn: viŝado de la anuso post fekado, portado de fekaĵoj, tenado de nemanĝindaĵojn ktp. Tial oni manĝu ne per ĝi, sed per la dekstra. Tiu ĉi faras ĉiujn aliajn taskojn: manĝi, skribi, doni ion al iu, frapi, saluti, trinki, labori ktp. La maldekstra povas tamen helpi al la dekstra, kiam tiu ĉi sola ne povas fari taskojn. Se iu estas frapita per la maldekstra mano, tiun oni konsideras malpurigita, kaj tiel necesas repurigi lin. Same oni ne tuŝu iun per maldekstra piedo. Antaŭe kaj nun en multaj vilaĝoj, en

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

lernejoj, oni neniam permesas, ke lernantoj skribu per la maldekstra mano. Neniam per la maldekstra mano oni ricevu ion de iu, aŭ donu io al iu.

Aminda vivas en medio, kie la maldekstraj piedo kaj mano estas konsiderataj kiel malŝataĵoj, malpurigaĵoj. Tial, kiam ŝi kredis, ke mi manĝas per la maldekstra mano, ŝi ne estis tute kontenta.



Fonto: **LAŬTE!**, numero 150, novembro 2000.

Versoj nostalgiaj

Dominique Sébillotte (1.12.1997)

Ankoraŭ juna hieraŭ estis mi kaj am' en kor' mia kantis,

Same kiel belan vinberaron bluan vivon mi mordegis
Kaj vinon novan de sun' somera brunruĝigitan ŝatrinkis,

Temp' maliceta sed esperojn frenezajn miajn forportis
Kaj al mort' antaŭen jam paŝegas mi,
Lasante laboron de destin' mia nefinitan malantaŭ mi.

(27.8.1997)

Fonto: **LAŬTE!** numero 134, marto 1998.

La 12-a MONA Kunveno



Kelkaj pensas, ke UEA estas nederlanda hipopotamo (cetere, malofta kaj estingiĝanta besto-speco), sed en la realo ĝi estas gazelo kuranta en la dezertoj de Irano. Kunkuru, membriĝu, donacu, sed ĉefe informu pri Esperanto kaj instruu ĝin. Ĉio

cetera estas fest-paroladoj. Malfermiĝas la aliĝoj al la 12-a Mezorianta Kunveno en Irano. Legu ĉiujn informojn en :

https://uea.org/vikio/La_dekdua_Mezorienta_Kunveno_en_Irano

Komisiono MONA

Jam eblas aliĝi al la 12-a Mezorianta Kunveno okazonta de la 28-a al la 31-a de marto 2019 en Kaŝano - كاشان - Irano sub la temo "La Esperanto-movado en Meza Oriento kaj Norda Afriko". UEA gratulas la lokajn aktivulojn de Irano kaj sian Komisionon pri Meza Oriento kaj Norda Afriko pro tio. La mondo vin deziras sukceson!

UEA

Solvo de la krucvortenigmo

N	I	K	O	T	I	N	O
O	G		E	T	N	O	N
M	I	A		T	E	K	O
E	B	L	I		P	E	R
S	U	R	F	O		Ĉ	O
	D	E	I	R	O		K
N		P	O	E	M	O	
O	S		S	P	I	R	O
L	I	A		O	R	O	N
E	D	R	O		P	L	I
I	R	A	N	A		O	D
Ĉ	O	K	O	L	A	D	O

